- Iel ni devas aranßi, ke ni tamen restu kune – mi diras, meditante pri ia ruza solvo. – Eble, se ni petus la kapitanon postenigi nin inter la ok homojn.

- Mi neniel iros kun la ok personoj en tiun oazon.

- Kiel vi komprenas tion?

- Mi iros al Igori.

- Ãu vi frenezißis?

- Bonvolu paroli pli klare – ekgrumblis £tipulo. – Kion signifas tiu multe da sensenca¢o?

- Se mi jam foriros de tie ¤i – li diris malgaje -, mi rezignos ankaª miajn plej bonajn amikojn, tiam mi almenaª rigardos, kion vidis tiu febra Francis Barré en Igori?

Alfonso la Neniu ne nur tial memorigis pri linko, ¤ar li estis rapida kaj senbrua: la delikata, saßa vizaßo, lia flatema konduto kaj la ruza maniero, kiel li ¤irkaªretis iun nerektavoje por inklinigi iun al io: li similis al kateska bestio.

Tiu „se mi jam forlasos miajn plej bonajn amikojn”, estis tia suspektinda emociißo.

- Se vi iros al Igori – diris Hopkins -, tiam vi forlasos ne nur viajn amikojn, sed ankaª vian prudenton. Ãu vi volas konstrui fervojon?! Ãe Kongo?

- Vi pravas – li kapjesis -, mi tute ne prenus sur mian koron, ke vi kuregu en tian danßeron.

- Ne timu pri mi! – kriegis la dikulo ekster si. – Mi rifuzas tia¢on!

Li kuregis el la kantino, anasirante sur siaj kurbaj kruroj, kaj li frapfermis la pordon tiel, ke la manßiloj ektremis sur la tablo, kaj la bildo de marÙalo Joffre falis de sur la muro.

- Vi nur restu ¤i tie – diris Alfonso la Neniu trankvile. – Mi promesis al Yvonne Barré, ke mi ne rezeignas solvi la aferon.

- Ãu vi korespondas?

- Jes… eventuale.

£ajnis, ke li estas embarasita. Kio ßi estas? Ãu li korespondas kun la virino? Kaj li sekretas tion?… Li havas ion forkaÙindan. Li ne kuraßas rigardi en miajn okulojn!

- Ãu Ùi skribis ion pri mi de tiam?

- Kelkajn… liniojn… La Turka Sultano rakontis tiom multe pri viaj sultaj romanoj… - li grumblis.

- Vi ne rajtas forsekreti tion! Sciu, se vi ne laªtlegos Ùian leteron, mi skribos vian agmaniero al fraªlino Yvonne Barré.

- Mi do povas legi ßin… Kvankam tio ja estas mia afero… kaj…

- Mi atentigas vin, ke laªtlegu la leteron, cetere vi havos problemon kun mi.

Mi opinias, ke mia vireca konduto forte impresis lin. La unuan fojon en mia vivo mi vidis retirißi tiun netimigeblan homon. Li Ùovis sian manon en la poÙon trankvile kaj eltiris leteron.

- Mi ne pensas, ke Ùi skribis tion sincere – li rimarkis mallaªte, poste li komencis legi:

„… En via lasta letero vi ne menciis sinjoron Fowler-on…”

- Ãar mi skribis… nur la esencon – li balbutis embarasite.

Mi ridetis pri li. Nun jam mi sciis, de kie blovas la vento. „La ¢aluzo estas diabla malsano, kaj ßi malofte elektas siajn rimedojn” – skribas ie grava verkisto.

- Nur daªrigu!

- „Min interesas la karaktero de via amiko – Ùi daªrigis. – Kial mi ne renkontißis kun tia viro, kiu estas erudiciulo, kaj li havas ne¤iutagajn maldekstamanajn rektajn batojn. Kiel nobla koro, alta inteligenteco kaj kavaleria konduto karakterizas lin. Kvazaª denove estus revivißinta en tiu homo iu el la tri korpogardistoj. Mi sentas tiel, ke li estos tiu, kiu malkovros la sekreton de mia frato, kaj li staros antaª min iun tagon.”

Li ¤esis la legadon.

- Daªrigu! – mi kriis ekscitite.

- Jen estas la fino de la letero…

- Malvere!

Li legis ßin plu malbonhumore:

- „Kiam li staros antaª min, kaj mi premos lian malmolan, virecan manon, mi estos tre feli¤a. Kion vi pensas, ¤u tiu granda homo opinius min inda al si mem?”

- Ne estis bela afero de vi, ke vi forsekretis tion!

- Kial? Ãu vi okupißas pri la afero de Francis Barré aª mi? Ãu vi pensas, ke mi iros en Igori-on tial, ke vi akaparu tiun virinon de antaª mi?

- £i fermis min en sian koron – mi diris poezie.

- £i amos tiun, kiu oferante e¤ sian vivon malkovros la sekreton de Ùia frato. Mi iros en Igori-on! Mi estas do iu el la tri korpogradistoj!

- Kia afero… estas tiu… kun la tri korpogardistoj?

- Iam tri soldatoj, riskantaj sian vivon kunportis la kolieron de la franca reßino el la palaco de princo Buckingham.

- Mi ne sciis… Sed ni vivas en tiu ¤i fortika¢o, kvazaª enterigitoj. Nek radio, nek ¢urnaloj.

- Nu, rimarku bone: mi iros en Igori-on ne tial, ke mi eltiru por vi la maronojn el la fajro. Aª ¤u vi volas fußi al Kongo de tie ¤i? Eskapi el ¤erko en la inferon?

- Tio ne koncernas vin – mi respondis kolere kaj lasis lin tie.

2

Neniu Alfonso sekvan tagon gardostaris ¤e la akvocisterno. Kiam li aªdis, ke la patrolo proksimißas, li apogis sian fusilon, ekfumis cigaredon kaj eksidis sur mejloÙtonon.

- Senrangulo! Ãu vi frenezißis?! Aª vi estas freneza? – alkrias lin la gvidanto de la patrolo.

- Mi estas ebria.

Mi scias certe, ke li ne drinkis e¤ unu guton. Sed sekvan tagon li jam sidis en la karcero apud Levin, kiu intertempe ricevis ¤iuspecajn fiÙa¢ojn de ni. Ni ekÙatis la flegman, trampan maljunulon. Neniu scias, kial? Ofte ne la logiko teksas la antipation kaj amikan senton inter la homoj.

Mi pensas, ke ßi estis tre saßa diro. Dume alvenis la eskorto: kvardek malliberuloj kaj dudek kvin armitaj akompanantoj.

Tiam okazis, ke dum la tago de la elpago de soldoj malaperis tiu malgranda blua, tola sako de sur la skribotablo de la serßento, el kiu oni pagas la monon. La legio bedaªrinde vere estas kolektejo de fiuloj. Kvankam la kompatinda Potrien ne estis suspektata, sed la respondeco Ùarßis lin. La kapitano, kiu malÙatas tiun eminentan suboficiron pro nekonata kaªzo, nun kaptis la okazon por definitive reguligi la konton kun Potrien. DeÙanßinte la serßenton el la Orano, li gvidos la eskorton al Igori.

Vespere Alfonso la Neniulo pakis la permesitan kvar kilogramojn da hava¢o. Li kunportis ankaª la kuirlibron de Levin.

- Kial vi bezonas tion?

- Levin petis min kunporti ßin. Eble li havos okazon kuiri por ni, kaj tiam ni laªtlegos la receptojn al li.

Hopkins donacis al li bluan saketon, por ke li metu siajn multajn malgrandajn objektojn en tiun. Ïenerale oni kutimas teni monerojn en ßi.

4

- Vidu, Hopkins… Tiu Neniu Alfonso… Tamen… hm…

- Kion vi balbutetas?! – li turnis sin al mi. La dikulo de post iom da tempo kverelis kun ¤iu. – Ne interesas min tiu idiota ula¤o!

- Vi tute ne scias, kial li iras al Igori? – mi diris morne. – La agopreteco de la viro iafoje loßas en la plej profunda kaÙejo de la animo.

Ïi, mi pensas, estis tre bela diro.

- Vi parolas tiel, kiel duon idioto. Kio estas?

- „Ser¤u la virinon” – mi citis malnovan anglan poeton. – Tial iras Alfonso la Neniulo al Igori.

- Ankaª ¤i tie mi povas ser¤i virinon por mi, se necese. Tial li ne devas iri al Igori. Ïi estas bela jup¤asado!

- Eble… ne li… sed mi devus iri al Igori – mi meditis melankolie.

- Iru, kien vi volas! Duonfrenezuloj! – li kriis kolere, kaj li preskaª glutis la estingißintan cigarstumpon, ¤ar li vane faris fumsu¤ojn por eksciti la arda¢on.

Sed la dubo maturißis en mi decido. La nobla virino ne trompißos pri mi!

Vespere mi anoncis al la serßento, ke mi perdis mian fusilon. Kvankam mi mem fosis ßin en kavernon, malantaª la fortika¢o.

Sekvonttage mi iris kun mia kvin kilograma paka¢o en la ¤elon.

- Saluton, sinjoro! – diris la granda Levin. – Vi konvenas al ni, kiel la rußa vino al la omaro.

Kelkiuj rimarkis, ke li fermu sian buson kaj ne ekscitu la malsatajn homojn. Morozaj estis tiuj kondamnitoj, venintaj demalproksime, lacaj pro la bataloj en la dezerto, survoje al Igori, kie la infero atendas ilin.

- Kial vi volas sekvi min perforte? – demandis Alfonso la Neniulo.

- Mi travidas la vualon – mi respondis kaj rikanis inter liajn okulojn. – Vi ne forlogos Yvonne-on de mi malantaª mia dorso.

Ni sidis ¤irkaª naªope sur la glua, malpura, insektoplena plano, kaj ni frostotremis pro malvarmo dum la vespero. Ne eblis movißi en la malvasta ejo. Iu rakontis pri Igori. Kongo! Terura klimato, malsekaj lignobarakoj, sovaße brutalaj gardistoj…

Hopkins havis pli multe da prudento. Li pravas. Estas freneza¢o iri tien.

- Ïi estas malpli bona ol la infero – diris la basvo¤a, grandkapa Colter, kiu estis kantoro iam en Kopenhago.

- Nur unu bona afero estas tie – klarigis Levin -, ke nenie trovißas tiel blanka viando de testudoj kiel tie. Simila estas la situacio norde, rilate la viando de la ¤asbestoj. Fine de la naªdekaj jaroj mi kuiris kapreolan spina¢on kun legom-haketa¢oj, ajlite… Mi faris ßin tiel, ke mi fandas duon kilogramon da lardo sur pikstango super la frita¢o…

Dum monatoj neniu manßis e¤ unu glutpecon. Ne estas mirinde, ke iom morozaj homoj estis kune. Diktrunka malliberulo ekstaris:

- Se vi ne ¤esos ¤i tiun historion tuj – li diris minace -, mi elpremos iun vian okulon per mia dikfingro.

- Mia afero estos elpremi la alian – diris la kantoro, kiu farißis iom laika dum la jaroj en la dezerto.

- Sed sinjoroj, ßi estis tiel mirinda manßa¢o, ¤ar mi ne trafritas ßin tute, por ke ßi restu bongusta kaj…

Puf! Iu batis lin je la kapo per malplena gamelo, sed forte.

Mi diris, ke ili estis iom morozaj homoj…

La kapobato silentigis Levin-on dum la vespero e¤ dum nokto.

Matene malfermißis la pordo, kaj Hopkins enpaÙis, portanta kvin kilograman paka¢on, kun eksterordinare morna vizaßo.

- Alo! £tipulo! – kriis Alfonso la Neniulo kun ßojo. – Ãu vi do enuis?

- La sinjoroj ne interesas min – li diris kaj eksidis mezen, pro kio tiuj perdis la spiron, kiuj alpremißis al la muro.

- Ãu eble vi estas ¤i tie hazarde? – mi demandis ironie.

- Jes, se vi volas scii! Tute hazarde. – Li kondutis tre nervoze. – Iu fenestro rompißis sur la etaßo.

- Oni kondamnas neniun al punlaboro pro tio.

- Sed iu falis tra ßi sur la korton. Mia malnova malamiko. Kaporalo Marchande.

…Baldaª tamen evidentißis, ke antaª ol puni tiun malnovan malamikon, Hopkins la £tipulo drinkis multe da vino en la kantino kaj vendis sian unumonatan soldon al la kantinestro duonpreze.

Li do jam sciis antaªe, ke li ne ricevos soldon en la fortika¢o Manson, ¤ar li iros fari punlaboron.

KVARA ÃAPITRO

1

…Alfonso la Neniu ne pravis. Tamen estas pli bone nenifari en la enua fortika¢o, ol marÙi en la dezerto dum la tuta tago.

En la ladbotelo kun litro da malfreÙa akvo. Kies duonon ni devas verÙi en la kaserolegon vespere, ¤etere ni ne havas supon.

Varmo: kvindek-kvindek kvin celsiusgradoj.

La dezerta pulo boras sin sub niajn ungojn, ke la fingroj inflamas kaj pusas.

Polvo, Ùvito iritas la haªton, dum ßi estas rußa, kio jukas kaj brulumas…

Ni iris unu apud la alia tiel: du soldatoj kaj unu civilulo.

Ãar £tipulo ankoraª nun estas nur honora legiano, kiu laªdire nomißas Thorze, kaj li havas nenio farendan en la dezerto. Sed kiam li trud-insistas tiun temon, li ¤iam havas malagrabla¢on pro tio.

Kaj ankaª nia patro Potrien venas kun ni al Igori! Li gvidas la transporton. Estas fatale, kiaj aferoj okazas al la kompatindulo, de kiam malaperis la malgranda monsako de sur la tablo kun la soldoj.

Nekompreneble.

Se li ne estus senmakula, malnova soldato, oni starigus lin antaª la militan tribunalon. Tiel la kompatindulo estas nur transpostenigita al Igori.

Li iras avane, kaj preterirante la vicon, li strange rigardas sur nin, kvazaª li kolerus pro io. Krom la kvin kilograma paka¢o ni tute bone ekipis nin. Selim, la naªdek jara kafkuiristo, portis ¤ion post nin en la dezerton, kie jam ne estas kontrolo.

Pro tio li ricevis tutan sakon da moneroj de ni, li do faris ßin volonte.

Ni jam marÙis du tagojn en la dezerto. La varmo estas infera. Kompreneble ni parolas pri la afero de la kompatinda Francis Barré.

- Diablo forportu la Turkan Sultanon – kriis Hopkins, kaj li Ùvitie tiel, kvazaª li estus el graso. – Ke ¤esis skribi, la fiulo!

- Kaj li forprenis de la knabino la kopion de la letero de Francis Barré.

Alfonso la Neniulo kuntiris siajn brovojn, kiam Hopkins menciis nian suspektindan amikon.

- Tiu Turka Sultano iam havos malagrabla¢on pro liaj privataj vojoj – li diris enpensißante.

- Li ¤iam estas suspektinda!

- Sed li ¤iam klarigas tion!

Ïi estas stranga afero rilate la Turkon. Li faras ¤ion sola laª lia ruza, kaÙema maniero, kaj li konstante estas suspektinda, sed fine, antaª ol mortbati lin, li klarigas sin, kaj evidentißas, ke ni devas esti dankemaj al li.

- Unuavice mi ¤irkaªrigardos tie – diris Alfonso la Neniulo -, poste mi skribos al la knabino.

- Mi skribos – mi kriis.

- Prave – diras Hopkins -, li estas la verkisto.

Kaj li kra¤is.

Vespere nia ta¤mento ekbivakis, kaj post la vespermanßo ni ekripozis. Ekscito de stranga antaªsento stre¤ißis en ni.

Ni konkjektis, ke strangaj eventoj rapidas al ni. Malnovaj aventuristoj eksentas tia¢on.

Ãirkaª noktomeze ni vekißis pro granda bruo. Kelkaj soldatoj volis enterigi Levin-on. Li diradis receptojn en sia sonßo, kaj li tute ekscitis la malsatißintajn homojn per tio.

- Sed sinjoroj… - li balbuta¤is, kiam li jam estis premita en la polvon – mi sonßis pri sep plada fiÙ-vespermanßo. Ïi povas okazi al kiu ajn.

- Ãi tie ne sonßu pri bonaj manßa¢oj, per la sep sakramentoj!

- Sonßu pri tio, ke estas bone, se ni almenaª havas ion manßi!

Ili estus draste batintaj lin, se Alfonso la Nemiulo ne intervenas. Li kaptis trankvile la brakon de la plej atakema homo, tiu falis sur la genuojn kaj laªte ekkriis pro doloro. Du aliaj malliberuloj volis flankenpuÙi la hispanon, kaj komencißis interbatado. Hopkins kaj mi tuj estis tie. Pasis proksimume dudek minutoj, kiam ni triope draste draÙis la tutan transporton.

Fine venis tien la soldatoj kaj ankaª Potrien.

- Kio okazis?

- Kredu min, oni volis enterigi min… - lamentis Levin. - Tia¢o, mi pensas, nek en la legio estas en ordo.

- Kiuj interbatadis? – li demandis kun ekbrilaj okuloj, ¤ar li sciis bone, ke tia¢o ne okazas sen ni.

- Tiuj tri sinjoroj defendis min.

- Ãu sinjoroj? – li demandis ironie. – Ãu la eskorto konsistas ne el friponoj, sed el sinjoroj? Mi reduktos la akvoporcion de tiuj tri sinjoroj je la duono por la morgaªa tago.

…Tiun Potrieron persekutas la fato. Iu Ùtelis lian ladbotelon. Kruela puno estas tio en la dezerto, dum marÙado. Kvankam ni jam ekiris je la kvina horo aªrore.

En Saharo, inter malliberuloj, povas okazi e¤ tia fripona¢o. Kompreneble ne estas eblo, nek en la kazo de la serßento, ke li ricevu alian porcion el la zorgeme porciigita akvo. Sed tiu Potrien estas ¤arpentita ne el tia ligno, ke li pensu tia¢on.

Li marÙis ßis vespero sen akvo.

En Saharo!

Ne unu junulo mortus. Sed li iras rektadorse, kiel arbo, kun iom kongeste rulißantaj okuloj, kelkfoje haltante. Sed li iras.

Ni ne suferas tiom. Tiu lerta Hopkins akiris botelon da akvo de ie. Egalan al tuttaga porcio. Estas mirinde, de kie. Sed la sagaca legiano ¤iam helpas sin mem. Poste ni e¤ kantis, kaj tio iomete nervozigis Potrier-on. Ja, vejno pulsadis sur lia frunto, kaj kelkfoje li spiris profunde kun fermitaj okuloj. Sed li marÙis. Avane!

Tiu homo konsistis el fero. Estas egale, ¤u li estas amiko aª malamiko: li meritas ¤ies aprecon. Mi paÙis antaª lin el la vico.

- Kion vi volas, longa fripono? – li demandis lace.

- Por ni sufi¤as malmulte da akvo, mon chef. Ni proponas trinki iom da akvo al sinjoro serßento…

Li okulmezuris min kun profunda abomeno.

- Do la duon porcio farißis tiel multe… hm… Konservu vian akvon. Nom du nom… Ãu vi pensas, ke mi akceptas helpon de tiaj friponoj. Se la respublikestro demandos: „Diru Potrien, kiel vi marÙis tra la dezerto post dekdu jara soldatservo?”, mi respondos: „ßi okazis tiel, mon President, ke kelkaj sispektindaj friponoj indulgis min.” Sed se vi jam estas ¤i tie, vi kaj la aliaj du ula¤oj ricevos ordonon: vi devas konstrui unumetran remparon dum la vespera ripozo, mi atendas atakon hodiaª vespere. Vi triope iru porti Ùtonojn.

Tio estis lia respondo. La batalo denove komencißis inter ni.

Vespere estis amare pene porti Ùtonojn post la marÙado. Sed nek ni estis el prun-marmelado. Post unu kaj duonhoro, tute kovritaj de neßeblanka polvo, sed ni staris antaª li, kiel palisoj rektaj.

- Ni amasigis la Ùtonojn, bezonatajn al la remparo, mon chef.

Li okulmezuris nin. Ankaª li sciis bone, kio estas tiu „plenuma¢o”. Kiu staras sur siaj propraj piedoj en la dezerto, tiu estas el Ùtalo.

- Bone! Forportu vin!… Kanajloj…!

La subkaporalo venkis nian trion post la noktomezo. Li estis kolera.

- La serßento… atendas atakon. Damne. Li ordonis sendi vin patroli. Ni iru.

Ïi estis terura vojo. MarÙado post Ùtonkolektado, kun akredoloraj membroj, ira¤i en la froste malvarmißinta dezerto.

Kaj matene, kiam la dezerto farißos varmega kiel bakforno, marÙi plu sen ripozo.

Sekvonttage ni tamen kantis, kiam la eskorto ekiris.

2

La fato ¤irkaªas tiun kompatindan Potrier-on. Estis tagmeza ripozo, longa bivakado, ßis la netolerebla varmego iom mildißas. Tiam oni de¢etas ¤ion de sur si kaj dormas.

Iu fripono la Ùuojn de la bona, olda Potrien metis duon metron flanken el la ombro de la tendo, sur la sunon.

Ïi estas stulta, drasta Ùerco en la legio, ¤ar la eksterordinara varmo rapide sekigas la ledon, la Ùuoj Ùrumpas, kaj oni povas nur perforte surpreni ilin. MarÙi en tiaj botoj estas infera sufero. Sed krom tio malaperis ankaª liaj meleolÙirmiloj, do la polvo penetros tra la faªkoj de la Ùuoj kaj inter la la¤oj sur la dolorajn, vunditajn piedojn.

Ïi estas vere fia Ùereco.

Kvankam la serßento marÙas sen plendo, sed mi opinias, li neniam forgesos tiun tagon.

Ni sufi¤e bone eltenis la marÙadon, ¤ar ni ¤irkaªvidis niajn piedojn per piedtukoj. Hopkis tajlis novajn ¤ifonojn por si mem tiucele dum la tagmeza ripozo. Tiu lerta homo trovis longajn maleolÙirmilojn, el kiuj li rutine faris piedtukojn.

3

La ßangalo bezonis nur naª vitkimojn, kio estas malofta. Jam okazis, ke neniu alvenis el tuta eskorto. Ãiu mortis dumvoje pro disenterio, flava febro aª vojerarinte, ie en la profundo de la praarbaro.

Indißena gvidanto kondukis ilin de Fort Lamy al Fort Monbras, de tie eskorto akompanis ilin al Kongo tra malsekura regiono. Dume sagoj de nanaj pigmeoj kaj buÙmanoj siblis preter ni el la direkto de la netravidebla densejo. Kvar homoj mortis pro venenaj sagoj, du pro piko de ia nekonata insekto, tri pro la febro. Entute naª personoj.

Sed la plimulto marÙis, relative sanaj, en la humide varmega, eterne duonluma, Ùimodora ßantalo. Ni tran¤is la sarmentojn, rompis la veprojn, ni luktis kun la kunplektißintaj tenakloj, dornoj de la praarbaro, sangante pro la milionoj da moskitoj kaj pro la hirudoj de la loza, mar¤a grundo.

Ïi estas vere granda provo de la forto, kiu estas ßisosta viro.

Iafoje densa pluvo falis dum la tuta tago, kaj poste oni sufokißadis pro la pezaj vaporoj de la putranta grundo. Niaj ¤iuj ostoj akre doloris neelteneble.

Sed fine sur la roka bordo de Kongo marÙante al oriento, ni ekvidis la punkolonion Igori, fonditan en la plej forlasita regiono de la mondo!

Kie la sovaßa riverego, torentanta en la fluejo desegnis ßiajn plej kapricajn kurbojn, tie videblißis viadukto, arkanta super iu abismo. Multaj puktetoj svarmis tie, kaj oni puÙis vagonojn sur privata tran¤trako.

Ankaª Igori mem estis videbla. Blankaj muroj, pafaperturoj kaj parapetoj, kun alta gvatejo, por ke la gardostaranto povu vidi malproksimen al la pado, kondukanta el la ßangalo.

Kiam la sentinelo ekvidis la proksimißantan ta¤menton, la trumpeto tuj eksonis.

„Al la armiloj!”

- De nun ßi estos nia garnizono! – grumblis Hopkins dume.

- Eblas, ke vi farißos kelkajn kilogramojn malpli peza, kaj ne vi estos la plej dika fripono – diris Alfonso la Neniulo.

Hopkins murmuris kelkajn tre gravajn ofendojn en si mem. Mi perfekte komprenis lian malbonhumoron. Ni sciis bone, kia vida¢o akceptos nin en la fortika¢o.

Terure maldikißintaj, skeletosimilaj, duonmortaj malliberuloj, malesperißintaj, senanimaj gardistoj kun flava vizaßo. Malpura¢o, kontaßo, insektoplenaj kuÙejoj, ¤irkaªa¢o ne inde e¤ por bestoj… Tendaro, kie gravas, ke terurißu tiu, kiu aªdas la vorton: Igori!

Ni venis ¤i tien. Pro virino, kiun ni ne konas.

Sed ni alvenis.

La pordego de la fortika¢o malfermißis, kaj la eskorto eniras. Jen estas Igori. Poste sekvas serio de surprizoj.

Kio ßi estas? Ãu puntendaro?!

La pordego donas vidon al la ¤efplaco de Igori. Pura, bela, blanka vojo, borderita de palmoj. Normalaj, malgrandaj, flavaj konstrua¢oj, amikeme ridantaj soldatoj kaj…

Kaj promenantaj malliberuloj! Sed ili estas gajaj, iom bone nutritaj. Kiel ni iras plu al la stabejo, ni vidas pli kaj pli novajn malliberulojn, soldatojn, ili ¤iuj estas grasißantaj homoj! Ankaª ilia vesta¢o estas en bona ordo, ili amikeme ridetantaj mansvingas al ni.

- He… - flustras Hopkins -, mi pensas, ke nia marÙdirekto estis erara, kaj ni alvenis al la franca Riviero, en iun multekostan sanatorion.

- Nur ßisatendu ties finon – mi grumblis -, ni ekscios, kio estas malbona en la tuta afero.

Sed vane ni atendis.

Kapitano venis en la korton de la kazerno por inspekti la eskorton. Li estas amikema, afabla, iom frue blankharißanta soldato. Li ridetas kare. Li portas dikajn, mallongajn lipharojn kaj monoklon.

- Jen estas la eskorto, mon colonel – raportis Potrien. – Etato: tridek du malliberuloj, dudek tri akompanantaj soldatoj kaj unu suboficiro.

- Tre bone – respondis la kapitano ridetante. – Nu do, vi ne havos malbonan sorton ¤i tie. Mia principo estas tio, ke la humana atmosfero de la puntendaro redonas la memfidon kaj la honestosenton de la soldatoj, kiuj paÙis sur malbonan vojon. La servo ne estos multa kaj malfacila – li diris al Potrien, kvazaª ian ordonon -, post tio ¤iu povas fari tion, kion li volas. Dizerti estas neeble. La plej proksima loßata loko trovißas je dumil mejloj.

Li amikeme mansvingis kaj iris.

Potrien postrigardis lin konsternite.

Ãu tia¢o eblas? Li vidis ion novan post dek du jara soldatservo. Iu de¢oranta suboficiro de la garnizoro montris al ni la barakon, kie ni loßos. Ïi estas pura, bela, luma lignodomo. Certe nek insektoj trovißas tie, ¤ar la domo estas konstruita sur Ùtonplato. La lito estas bona kaj…

Miraklinde!… Du kovriloj. En puntendaro oni ne kutimas doni e¤ unu maldikan kovrilon!

La serßento fikse rigardas en la okulojn de la ¤itiea de¢oranto, kiu pipfumas indiferente.

- Vi devas zorgi pri la florpotoj sur la fenestro-kornico – diris iu gardisto fine. – Sinjoro kapitano ordonis tion severe.

- Fine mi aªdas ankaª severan ordonon en la puntendaro – respondas Potrien ironie.

- Kial? Ãu eble vi Ùatus tion, serßento, se la homoj mortus amase ¤i tie?

- Diablo scias, kiel ßi estas, sed tiu ¤i loko similas la ¤io, sed ne al puntendaro.

- Malgraª tio, la vivo ne estas tute bonega ¤i tie. Ãiu havas reªmatismon. Dum la malseka sezono multaj homoj havas febron. Kongo estas malbonodora, kaj la vaporplena, varmega aero ronßas la organismon. Ni do vivas almenaª inter homaj cirkonstancoj… Ãi tie, mi jam nun avertas vin, serßento, ne klopodu ordonadi, ¤ar la kapitano Ùatas, ke ¤iu faru tion kion li volas.

- Ãu eble ne ekzistas tagordono? Ãu la plankpurigadon faras la serßento?

- Kiel bela ßi estus – diris Hopkins entuziasme, kiu jam kusis sur sia lito nuda.

Potrien ¢etis eksterman rigardon al li.

- Nu – diris la kaporalo -, de¢oro tamen estas ¤i tie, krome pureco, granda pureco, kaj pikedo ¤e la pordego.

- Ãu la fervojo?

- Ïi trovißas proksimume du mejlojn da distanco, kaj negraj indißenoj laboras tie. Nur kverelemaj soldatoj estas senditaj tien iafoje.

- Kiel opinias… la kontrolkomitato pri ¤io ¤i… Ili jam certe inspektadis ¤i tie?

- Laª mia scio, dufoje. Sed ili alvenis nur foje. La kompatinda generalo Duron gvidis la unuan.

- Kiun atakis ie la negraj bantuoj survoje?…

- Jes. Ili masakris lin kaj ankaª lian akompanantaron. Krome komitato vizitis nin pasintjare. Ili rigardis la tendaron kaj estis tre kontentaj. La garnizonestro tiam rangaltißis kapitano. Li estis laªdita.

- Ãu ili vidis… promeni… la malliberulojn?

- Ni do… sciis… pri ilia… alveno, kaj la malliberuloj laboris, kaj ni malaperigis kelkajn, superfluajn, komfortajn objektojn… Sed la pureco… la ordo… krome, kion la malliberuloj diris, tio pla¤is al ili. Ãar oni havas tre malmulte da mono por tio…

Potrien foriris moroze kun pezaj paÙoj el la ¤ambro de la soldatoj. Io ne pla¤is al li.

Iu malliberulo kriis laªte:

- He! Kaporalo! Ãu ni ne ricevos pranzon?

- Jes, jes, nur ne kriegu.

- Ãu vi pensas, ke mi petu permeson de vi!

Oni ne povas diri, ke la dis¤iplo estis tro severa. Nu sed kie estas ankoraª la vera surprizo? Post nelonge senrangulo venis kun la jena ekkrio:

- Kiu kion deziras?!

Kaj la malliberuloj mendis pranzon. Jes, bonvolu kredi. Kiel en kafejo. Mi preskaª falis de sur la seßo.

- Mi petas nigran kafon kun biskvito – diris iu malliberulo, kondamnita al dek jara punlaboro.

- Donu al mi teon, sed kun multe da rumo, kanajlo, aª mi iros plendi al la kapitano.

- Portu al mi litron da rußa vino, kaj ian vianda¢on.

- Kion vi deziras? – li turnis sin al ni.

Mi estis en ser¤ema humoro.

- Teon kun rumo kaj Ùinkon kun buterpano, krome ankaª magazinon.

Neniu surprizißis. La junulo kapjesis.

- Kiun magazinon vi deziras? Ãar la ¢urnaloj alvenos el Leopoldville nur morgaª.

- Kio ßi estas? Ãu puntendaro aª la pariza kafejo Dom?!

…Kaj nun proksimißis nuda homo, kiel li ¢us ellitißis, kun larße malfermitaj okuloj, kiel ia somnambulo.

Levin!

- Homo – li diris flustrante -, ¤u eblas ¤i tie, ke mi ricevu marinitan fiÙ-fileon laª la maniero de Turbigo kun ovo, distran¤ita je du pecoj, stufita en iometa vino?…

Kaj li tremis per tuta korpo.

- Mi provos – respondis la soldato levinte sian Ùultron. – Kvankam ne estas dieto por idiotoj ¤i tie.

- Ho, domaße! – lamentis Hopkins en sia lito.

- Ãu vi? – mi demandis.

- Ke la veka trumpeto tuj eksonos, kaj ni povas marÙa¤i plu… Vi priridos min, kiam mi rakontos tiun idiotan sonßon…

Mi konfesas, ke ankaª mi pensis pri tio unu momenton pri frue, ke la tuto estas stulta sonßo. Sed ßi ne finißis.

Post nelonge la pranzo estis surtabligita. Por ¤iu aparte, kiu kion petis.

Mi ricevis ilustritan magazinon!

Bona afero, ¤u ne?

Kiu petis teon, li flaris tion, ¤u sufi¤e da rumo estas en ßi. Oni alportis al mi tian panon kun Ùinko, kian nek la kapitano manßis en Manson. Sed la plej grava momento estis tio, kiam oni surtabligis al Levin la marinitan fiÙon kun la ovo distran¤ita je du pecoj, laª la maniero de Turbigo.

Unue li ploris dum minutoj, poste li pie gustumis ßin kun fermitaj okuloj. Ni silentis dum la efiko de la ceremonia sceno.

Post la gluto de la unua manßa¢peco li levis sian rigardon severe kaj konsternite, kvazaª li estus venenita.

- Homoj… - li flustris per vo¤o singultanta – kiu faris tiun ¤i manßa¢on, tiu lernis ¤e Levin… - Li kulere gustumis ßin denove. – Li estas franco, ¤ar li ne metis en ßin sufi¤e da pipro… Li estas needzißinta, ¤ar li ne dol¤igis la tartar-saªcon…

- Kaj li ne estas junulo – diris Hopkins. – Li havas minimume kvardek jarojn.

- De kie vi scias tion?

- Li blankharißas…

Kaj li levis haron de sur la rando de la telero de Levin.

4

- Kie estas… tiu… kiu kuiris ßin? – kriis Levin.

La soldato rigardis konfuzite dum momento.

- En la kantino… kuiristo…

- Mi devas vidi lin. Mi volas paroli kun lin! Li estas mia dis¤iplo… Kiel li nomißas?

- Courchy.

- Mi ne havis tian dis¤iplon!

- Kie vi instruis? – demandis iu arabo.

- Mi estas Levin – diris la blankhara frandemulo malestime kaj turnis sin al ni. – Klarigu al li, kion signifas tiu nomo e¤ hodiaª.

Ni ¤iuj tri silentis kun mallevitaj okuloj pri tio, ke la nomo de Levin kion signifas e¤ hodiaª.

Post la kvina horo ni iris promeni, kaj niaj buÙo kaj okuloj disstre¤ißis pro la miro ¤iupaÙe.

Sur iu tereno la malliberuloj kaj la gardistoj amuzis sin per tiu certa ludo, nomata kriketo, kio estas modo inter la bonhavaj civitanoj en grandaj urboj. Dume junulo kredencis trinka¢on el la kantino, kaj la ludantoj ridas, bruas.

Ie sonas radio, kaj aªdißas gajaj vo¤oj de kantado. Iom malproksime estas kuglejo. Ãie fumas pipoj, oni kredencas trinka¢on ¤ien, kaj grase brilantaj, gajaj vizaßoj rikanas al la plenaj glasoj en la sufoka varmego.

- Kio? – demandis Neniulo.

- Hm… - rimarkis Hopkins.

- Nu jes – mi finis mallaªte.

Ni komprenis unu la alian. Nun ia tute stranga afero estas en la fono. La franca kolonia armeo ne estas fama pri tio, ke ßi establus ripozejon por la punitaj senrangaj soldatoj.

Ni eniras en la kantinon.

Mi preskaª reÙancelißas tra la pordo! Mi neniam vidis tian kantinon! Poluritaj mebloj, komfortaj brakseßoj, silka kurteno, drinkejtablo, bildoj sur la muro kaj negra drinka¢-miksisto.

Dio atestu, li skuas metalan koktel-miksilon kaj metas glacierojn en kvar glasojn, li dispecigas ankaª citromÙelojn, kaj fine li verÙas la drinka¢on en la glasojn.

Ïi estas la puntendaro!

En la angulo staras fortepiano, kaj homo ludas sentimentalajn kantojn en trivita redingoto.

Ãu ßi estus igori? La plej terura Compagnie Discipline de Afriko? La misfamega puntendaro?

Nun la fortepianisto turnas sin. Li estas granda, pala, dika homo kun malloz-haªta vizaßo kaj kun dormemaj okuloj. Kvazaª mi estus batita je la kapo. Kvasti¤.

Hopkins ekkrias. Sed la muzikisto rigardas super nia kapo, kvazaª li neniam estus vidinta nin, poste li ludas plu.

Li estis la s*injoro Profesoro*. Fedor Kvasti¤, la Ùipkuracisto, havanta antaªvivon, kiu lastfoje travagadis kun ni la duonon de Afriko pro krimafero.

Kvasti¤! Sed li estis nek *honora* soldato!

Certe li havis kaªzon ne rekoni nin. Tia¢o eblas. Niaspecaj homoj rapide komprenas unu la alian. Pro io estus pli bone foriri el lia proksimo. Ni komprenas. Ni ne scivoladas. Ni deturnas nin de la fortepiano kaj eksidas.

Fedor Kvasti¤ estis konta membro de la krimula mondo en la haveno de Oran kiel amuzaj-pianisto kaj familia kuracisto. Dum la cara regado li estis kuracisto ¤e la rusa floto, poste pro ¤iuspecaj narkotiloj li paÙis sur la vojon, kondukantan ¤iam pli malsupren al la demoralißo, fine li tute dronis en la mar¤o. De tiam ni havas bonan amikan rilaton kun li. Jen estas malgaja sorto de homo.

- Kiel vi opinias? – mi demandis Alfonson la Neniulon. – La *sinjoro Profesoro!*

- Ia skandala afero okazas ¤i tie. Francis Barré pravis. Se la *sinjoro Profesoro* ne volas, ke ni rekonu lin, tiam li certe havas kaªzon fari tion, kaj ßis li ne klarigos tion, ni ne okupißos pri li.

- Ni do ne konas lin – murmuretis Hopkins, kaj li turnis sin la la kantinestro, kiu venis al nia tablo. – Kion eblas manßi?

- Kion vi deziras…

…Estis nekredeble, kion ni vidis. Kvazaª ni estus en ia kara, somera restoracio de Montmartre la diman¤on de pentekosto.

- Kiu estas tiu, kiu fortepianas? – demandis Alfonso la Neniulo kaj montris al Kvasti¤.

- Fortepianisto. Krome li estas doktoro. Li kuracas en la hospitalo apud profesoro Winter…

Kiel venis Kvasti¤ ¤i tien? Kaj kio okazas ¤i tie? La malliberuloj drinkas, kartludas kun la gardistoj. Mi vidis pezan malliberulon, kondamnitan al punlaboro, kiu estis minimume cent kilograma, sed onidire li malgrasißis iomete dum la pluva sezono.

- Ni… ne havas monon… - diras £tipulo al la restoraciestro.

- Male! Laª la sinjoro kapitano oni havu almenaª monon sur tiu ¤i malbenita loko. En la administrejo sidas kaporalo, kiu ¤iam donas ßin, kiam vi bezonas, kiom vi volas. Sed tio ne estas bezonata.

Kio okazas ¤i tie?! Ni kunrigardis, kiel idiotoj.

Kial vi miras? – demandas magra, malata kaporalo apud ni, kaj li mallaªte zumkantas.

- Diiru, kaporlao… de kiam ßi okazas tiel?

- Minimume kvin jarojn. Ni devas esti singardaj, ke ßi ne disvastißu, ¤ar ¤iu dezirus veni ¤i tien. Tial vi devas skribi tiajn leterojn, ke oni traktas vin malbone, vi mortos nelonge, kaj tia¢ojn.

Kaj li zumkantis iomete, dum li fermas sian buÙon.

Mirakla afero ßi estas!

- Jes! Ïi estas mirakla! – kapjesis la magra kaporalo. – Nur ne demandadu, uzu vian buÙon por manßi, tiam ßi restos miraklo.

Post la lasta vorto li jam denove kantas. Li estas idito!

- Nu, se iu volas scii, kial ekzistas tiu paradizo?

La kaporalo seriozißis.

- Kiu volas scii ion pri la paradizo, tiu rapide iros tien.

Alfonso la Neniulo levis sian Ùultron ridetante.

- Mi ne estas scivolema, kaj nek miaj amikoj. Restoraciestro, portu al ni rußan vinon!

La kaporalo tintigis sian glason kun la nia.

- Bone. Ni komprenas unu la alian. Onidire, kiu pri ¤io informißas, tiu baldaª maljunißos. Nu sed, ßi okazas ¤i tie inverse: kiu pri ¤io informißas, tiu mortos junaße en Igori…

Tiu ¤i homo estis tiel magra, tiel malalta kaj stulta¤-miena, kvazaª neevolunta adoleskulo iradus en uniformo. Li foriris orgojle kaj zumkantis.

- Tiu kaporalo estas vangofrapinda ula¤o – mi rimarkas.

- Kiu diris, ke li estas kaporalo? – demandis Alfonso la Neniulo.

- Eble vi vidis lian epoleton.

- Nur tiu rajtas viziti la suboficiran lernejon, kiu estas minimume cent okdek centimetrojn alta.

Li pravis! Ankaª mi povintus diveni tion.

Nun junula¤o paÙis en la kantinon. Mi jam vidis tiun vizaßon ie! Li estis pala, malgaja junulo en uniformo. Li estis beleta bubo kaj tute juna. Kiel venas tiaulo en la legion? En la puntendaron de Compagnie Discipline? Ne estis videbla en liaj okuloj, ke li rekonus nin, kvankam Ùajnis al mi, ke mi jam renkontis lin.

- Vi! Mi jam vidis tiun bubon ie!

- Ankaª mi! – diris Hopkins.

- Mi ne konas lin – diris Alfonso la Neniulo kaj levis siajn Ùultrojn -, sed li estas juna soldato, tie certas.

- He, knabo! – mi kriis. – Venu ¤i tien!

Li timeme rigardis al ni.

- Kion vi volas?

- Kie ni renkontißis?

- Mi vere ne memoras tion – li respondis kaj tuj foriris. Kiam li turnis sin kaj ekvidis nin, li komencis rapidi.

- Bonvolu halti, mi petas! – kriis Alfonso.

Li obeis timeme.

- Ni tiope venis el la fortika¢o Manson – li diris. – Jen estas Thorze, li nomißas John Fowler, kaj mi estas Alfonso la Neniulo.

Lia rigardo saltadis de iu homo al la alia dum sekundo.

- Mi ne scias – li balbuta¤is -, mi devas rapidi…

- Atendu min! – diras Alfonso la Neniulo kaj ekiras post la junula¤on.

Kion li volas de tiu bubo? Jam estas vespero, jam pasis la tempo de la vespersignalo, sed ¤i tie neniu zorgas pri tio.

Ebriaj, ridantaj, kantantaj homoj ira¤as ¤ie. Kri¤ado, interbatado, stertoro, rumoro plenigas la sufokan, varmegan nokton…

Mi iras kun Hopkins en la barkon, kaj ni enlitißas.

- Kie estas Potrien? – mi demandas.

- Ãu li mankas al vi?

- Ne… sed li malaperis subite.

Post duonhoro alvenas Alfonso la Neniulo. Parolante nenion, li enlitißas.

- He – diras Hopkins. – Ãu eble vi bonvolus buÙa¤i ion.

- Kion?… Okazis nenio.

- Kaj kian planon vi havas?

- Tion, ke mi dormos, se vi lasos min – li respondis kolere.

- Ãu la knabino? – mi kriis. – Kiu fidas nin?

- La knabino petos helpon, kiam Ùi bezonos nin.

- Kiajn idiota¢on vi parolas! Ãu Ùi petas helpon el Oran?

- Kial el Orano?

- Ãar Ùi estas tie! – ni kriis samtempe.

- Stultula¤o. Mi parolis kun Ùi ne pli ol unu minuto. Tiu juna knabo en la uniformo estas Yvonne Barré!

5

Yvonne Barré! Nu jes! £i estis konata pri la foto, kiun ni trovis en la tornistro de Francis Barré!

- Mi povintus pensi.

Kiam Alfonso la Neniulo diris tion, ke John Fowler, tiam Ùi rigardis sur min tiel strange… Kun stranga miro kaj emociißinte. Mi devas proli kun Ùi!

Sekvan tagon antaªtagmeze mi tenis miajn okulojn malfermite kaj ser¤is Ùin ¤ie. Sed mi vidis Ùin nenie.

Kelkaj oficiroj promenis sur la ¤efplaco, antaª la stabejo. Kaj kelkaj civiluloj en korko¤apelo. Ili certe estas inßenieroj…

Sed la *junula¤o* Yvonne Barré estas nenie. Ãar mi rapidis, ¤e iu turnißejo mi puÙißis al alta inßeniero…

Mi volis diri ian sin ekskuzon, sed la vorto haltis al mi en la gorßo.

La Turka Sultano!

Li staris antaª mi!

Sed kian ravan ekstera¢on li havis! Botoj kun longaj kruringoj, korko¤apelo, jako el tolo, kaj kio preskaª sendubigis lian identecon: pura ¤emizo!

La Turka Sultano!

Kompreneble ledujo pendas sur lia flanko, ¤ar same kiel Hopkins la £tipulo, ankaª li Ùatis tiajn elegantajn objektojn. Li tute ne surprizißas, kiel li rigardas sur min:

- Saluton, £inketo! Kion vi faras ¤i tie?

- Mi venis kun Alfonso la Neniulo kaj Hopkins la £tipulo – mi diras -, ¤ar ni kontrolas kelkajn aferojn.

Li rapide flustras al mi:

- Oni pensas ¤i tie, ke mi estas fripono.

- Ãu ßi ne estas tiel.

- Bone atentu! Se mi sukcesos akiri ilian fidon, tiam ni venkos… Gravas gardi la Ùajnon…

- Kian Ùajnon?

- Tion, ke mi kunlaboras kun ili. Mi sukcesis atingi, ke ili akceptis min kiel komplicon, kio estas unuaranga ofico. Ili ankoraª nun fidas min. Tio gravas… Ne rigardu malantaªen! Atentu! Nun mi estos groba kun vi pro la Ùajno. Kiu ¢us venas malantaª vi, tiu estas la ¤efrabisto.

Kaj li subite batis min je la brusto pro Ùajno.

- Mi diras tion – li kriis laªte -, ke zorgu pri nenio ¤i tie, kio ne estas via afero!

Mi tusadis iomete:

- Mi tute ne zorgas…

- Silentu! Mi konvas vin bone! – kaj li piedbatis min pro Ùajno tiel, ke ¤io farißis violkolora antaª miaj okuloj. Kiu venis malantaª mi, li nun estis apud mi. Li estis grandega, unuokula homo, en samtia vesta¢o, kiel Turko, sed li tenis skurßon en sia mano kaj cigaris.

- Mi konas vin ¤iujn bone! Sed nun vi traktos vin draste! Ãi tie ekzistas nenia flaresploro – kriegis mia suspektinda amiko kaj batis.

La unuokululo rigardis tien preterkure kaj iris plu.

- Vi estas perdißintaj homoj sen mi, £inketo. Kredu min – li ekskuzis sin. – Gravas la Ùajno.

Ãi-meze de la ¤efplaco estis tiel pompa angla ßardeno en la mezo de grandega, tutee rondforma asfalt-strio, ke ßi konvenis al iu grandsinjora kvartalo de Parizo. Laª la rando de la cirklo estis multaj etaj, bele konstruitaj domoj el argilbrikoj, drinkejo, tabakvendejo, sukera¢ejo, apoteko!… Oni nur miras. Ãu ßi estus la Kongo-regiono?!…

Igori?!

- Diru… ¤u ¤iu povas a¤eti ¤i tie?

- Jes kompreneble! Kaj mono ne estas bezonata al tio. Venu…

Ili eniris en la tabakvendejon. Elefante grasißinta legiano sidis malantª la breto. Li ekstaris suspirante kaj drasta alkriis nin kun kolera vizaßo:

- Nu, kion vi volas?

- Alvenis nova homo – diris Turko afable. – Donu al li, kara Graham, kvin skatolojn da egiptaj cigaredoj, dek pecojn da havanajn cigarojn, dekduon da bildkartojn kaj kelkajn sekurajn pinglojn…

Post unu minuto, kaj ¤io ¤i kuÙas antaª mi… Kvin skatoloj: Turmac, Laurens, Simon Arzt, Giuberq!… Kaj dek veraj, malhelbrunaj cigaroj havanaj, en lignokesteto, sur ¤iu cigaro estas po unu celofano!…

- Sankta ¤ielo. Ãu ßi estas la sovaßa regiono?! Kien venas nur rezolutaj homoj malofte, kun bone ekipita ekspedicio?

- Ãu mi sonßas?…

- Nu, kial vi gapas – diris Turko kaj batas min je la stomako pro Ùajno. – Se vi kondutos bone, fiulo, tiam vi povos vivi bone!

- Kial vi venis ¤i tien? – mi demandis la grasißintan tabakvendiston, kiam mi regajnas mian spiron, ¤ar spasmo kunpremis mian stomakon por iom da tempo.

- Iru en la inferon, via parolo lacigas min – li respondas spiregante, ¤ar li estas tiel dika.

- Nu, li ne estas tre delikatkonduta vendisto… - mi diras, kiam ni estas ekstere.

- Lasu tion. Li estus taªga ankaª en Eªropo, se li vendus senpage la cigaron Havano. Malmultaj a¤etantoj forirus pro lia konduto… Ili ne Ùatas vendi, sed ßi estas deviga, ¤ar oni designi ili por fari tion. Ãu vi volas manßi kukon? Jen estas la sukera¢ejo…

- Nekredeble!

Ni eniras en spegul-muran, bril-plankan ejon, kie estas pluÙ-foteloj, kelkaj malhelrußaj tapiÙoj kaj bildoj sur la muro… La aero estas malvarmeta, ¤ar ok-dek ventoliloj funkcias…

Santiel dika homo venas, kiel la tabakvendisto. Ãiu dikißas ¤i tie. Ne estas mirinde.

- Kion vi volas? – li demandas malafable.

- Mi Ùatus regali tiun ¤i fifaman ula¤on, por ke li vidu, kiel vivas tiu, kiu kondutas dece… Vi, ¤arlatano!

Kaj li surkra¤is min pro Ùajno.

- Kion vi volas! – demandas la sukera¢isto kolere, kiu estas malliberulo.

- Glacia¢on – mi respondas, post kiam mi viÙis mian vizaßon.

- Vi povintus diri tion e¤ pli frue – li grumblas kaj foriras blasfemante.

- £ajnas, ke li laboras ne volonte – mi rimarkas.

- Ne miru tion – respondas Turko -, fine ja neniu ßojas pro la punlaboro.

Sed la sukera¢isto jam revenas. Li metas la glacia¢on antaª nin dirante:

- Jen manßu!..

Ïi estas bela tono en sukera¢ejo. Priservante verkiston!

- Kiam ni denove estas ekstere, jam vesperißas. Samtempe eklumas multaj elektraj lampoj… La malgranda solenplaco komencas brili, kaj sonas muziko. Per megafono, oni dissendas ¢azmuzikon de eªropa radiostacio.

- Diru… kiu faras tion kaj kial? Ãu tiu homo estas freneza?

- Mi opinias, ke la plej saßa fripono de la memoreblaj tempoj faras la plej grandan negocon ¤i tie en Igori. Mi ankoraª ne vidas tion klare… Atentu… iu venas malantaª vi… - kaj Ùajne li batas min je la kapo, ke mi ekmordas mian langon, kaj mi havas orelzumadon.

La magra kaporalo kun kretena rideto, kiu kelkfoje zumkatas, nun preteriras min.

- Se vi spionados, mi elpremos viajn okulojn! – kriegis la Turka Sultano, kaj li forte vangofrapis min pro Ùajno.

La kaporalo iras plu, mi levas mian ¤apon kaj senpolvigas ßin.

- Tiu malata kaporalo – diras la Turka Sultano – estas la plej fia spiono. Li havas la moknomon Fadeno… li subaªskultas ¤iam…

- Kian celon oni havas ¤i tie?

- La malliberuloj estas feli¤aj. Ne ekzistas patrolo en Saharo. Ili vivas en la paradizo anstataª la infero de Igori, tio estas ilia celo.

- La malliberuloj estas feli¤aj. Ne ekzistas patrolo en Saharo. Ili vivas en la paradizo anstataª la infero de Igori, tio estas nia celo.

- Sed nur idioto povas vivi tiel: blinde, surde kredi tion, ke ßi estas la paradizo.

- Jes, kiel vi diras! Estu idioto, tiam vi povas vivi en la paradizo! Rigardu tiun sloganon, pentritan sur la muron.

Super la pordego interne, jen tio estis skribita majuskle:

ATENTON! ESTAS KONSIDERINDE!
„Feli¤aj estas la malri¤aj en spirito,
¤ar ilia estas la regno de la ¤ielo!”

- Prefere oni estus pentrintaj sur la fasadon tion – mi diras -, kiu kuraßas pensadi, tiun forportas la diablo.

- Tiel tamen estas pli bele. Ne estas bone pentri diablon sur muron… Ãu vi priparolis ian planon? – li demandas.

- Alfonso la Neniulo diras tion, ke ni devas forlasi la fortika¢on por paroli kun Francis Barré.

- Li estas grave malsana… Kio eblas, gardante la Ùajnon, mi provas fari ¤ion por vi.

- Tamen, sciu… hm… vi ¤iam manipulas tre suspektinde.

- Sed mi atingas ion, ßi gravas – li respondis kaj Ùajne piedbatis min je la genuo, ke ¤io mallumißis antaª mi. Mi ne rigardis malantaªen, sciante, ke denove venas iu malantaª mi, pro kiu estas bezonate gardi la Ùajnon.

- Tamen estus bone – mi rimarkis -, se vi ne kirlus la aferon ¤i tie, antaª ol priparoli tion kun ni.

- Nur konfidu tion al mi, mi ne petas konsilon de vi – li respondis kaj donis al mi du vangofrapojn. – Kaj nun jam iru, a¤ulo!

Mia ¤apelo denove falis pro la lasta vangofrapo, kaj mi kapturnißis. Mi returnißis, sed kien ajn mi rigardis, neniu venis.

- Kiun vi vidas proksimißi? – mi demandis.

- Ãu mi? Neniun.

- Kial do vi survangis min?!

- Ãar vi kolerigas min per viaj idiota¢oj! – li diris kaj lasis min tie.

KIVINA ÃAPITRO

1

Mi rakontis la okaza¢on al miaj amikoj. Alfonso la Neniulo sternißis sur la lito kaj diris nenion laª lia kutimo. £tipulo des pli multe parolis.

- Iam mi tamen batos la Turkan Sultanon violkolora!

- Nun li estas senkulpa – mi defendis nian suspektindan amikon. – Por li gravas la Ùajno ¤i tie. Kaj nun ne estas butero sur lia kapo, se li akompanis Yvonne-on ¤i tien.

- Li ne akompanis Ùin. Yvone venis sola – diris Alfonso la Neniulo mallaªte. – Yvonne Barré venis sola. £i diris al mi nokte, ke ni ne fidu la la Turka Sultano, ¤ar oni gardas Yvonne-on pro li. Li tuj malkaÙis la knabinon, kiam li ekvidis Ùin.

- Fripono!

Kio okazas ¤i tie? Kial li piedbatis min dum unu horo pro la *Ùajno?*

- Francis Barré estas en kaptiteco - daªrigis Neniulo -, se la knabino faros kian ajn suspektindan aferon, oni mortigos lian fraton kaj certe ankaª Ùin, Yvonne Barré diris tion hodiaª nokte, tial Ùi evitis nin.

- Kiel venis la knabino ¤i tien?

- £i akiris kurier-ordonon. £ajnas, ke Ùi havas sufi¤e bonajn miliatistajn kontaktojn. Oni sendis la kurieron al Igori por informißi pri Francis Barré. £i venis ¤i tien kun tiu duone falsa dokumento. Sed Ùi subite staris vidalvide al la Turka Sultano. Li tuj malkovris Ùin. Nun Ùi estas senpova, ¤ar se oni kaptos Ùin pro ia provado, ßi kostos la vivon de Ùia frato. Mi promesis al Ùi, ke mi eliros iel el la fortika¢o, kaj mi parolos, se eblas, kun Barré. La knabino povas fari nenion, de kiam la Turka Sultano makovris Ùin.

- Mi strangolos tiun Turkon – murmuris Hopkins la £tipulo, kaj li elprenis cigaron. Ãar li plenigis la binoklujon per cigaro en la kantino. – Li simple fußis de la knabino kun tiu kopia¢o, kiun ni sendis al Ùi pri la letero de Francis Barré, kaj nun li agadas ¤i tie kiel fiÙkaptisto en malklara akvo.

- Mi parolos kun la Turko – diris Neniulo. – Mi ne kredas, ke li estas tia fiulo. Li estas suspektinda, sed ne fiulo.

Subite alvenis patrolo, kaj la kapitano sekvi ßin kun sia kutima akompanantaro: kun la unuokululo kaj kun kelkaj inßenieroj.

- Jen tiuj tri homoj! – kriis iu akre kaj montris sur nin.

La Turka Sultano estis tiu!

- Kiuj vi estas? – demandis la kapitano.

- Ili venis ¤i tien - kriegis la Sultano - por flara¤i. Jen estas la letero, kiun skribis tiu ulo al la knabino! – Kaj li montris la leteron de Alfonso la Neniulo.

- Ili eniam plu miksos miaj kartojn! Ili iros en la inferon! Tiun friponon – li montris al mi – mi konfesigis hieraª. Ili venis flara¤i en la afero de Francis Barré!

Alfonso la Neniulo fikse rigardis la Turkon.

- Kiuj ili estas? – demandis la kapitano leginte la leteron, kaj li tre seriozißis.

- Li estas – montris al mi la Turko – stulta, sed ruza skoto. Li verka¤as idiota¢ojn kaj estas vanta frenezulo.

Kia mensogo! Mi kaj vanta!

- Jen estas £tipulo, la plej grava Ùtelisto en la mondo.

- Sed kiel mi povas vangofrapi! – diris Hopkins entuziasme, kvazaª ekskuzante sin, kaj maldekstramane li survangis la Turkan Sultanon… Sed tiel forte… Ke entuziasmo kaptas min e¤ post jaroj, pensante pri tiu vangofrapo.

La Turka Sultano renversis la tablon kaj du inßenierojn, kape li tratompis la pordon, tiel li falis sur la teron.

Ok personoj kaptis Hopkins-on, kaj li ricevis proksimume dudek vangofrapojn. Nu sed kiaj ili estis rilate al tiu unu?!

- Atentu! – kriis la kapitano. – Mi dekutimigos vin pri tio.

- Ili estas pli danßeraj ol kvindek policistoj! – kriis la Turka Sultano.

- Tiam ili estos senditaj al la fervojkonstruo. Ili laboros tie!

- Ãu ne estus pli bone likvidi ilin? – demandis la unuokula…

- Ne – diris la kapitano kategorie. – En Igori ne ekzistas mortkondamno, mi jam multfoje diris tion. – Li turnis sin al ni. - Ankaª vi sciißu: en Igori oni mortigas neniun. Certagrade ßi estas pli granda krueleco, ol la murdo. Post nelonge vi povos sperti tion. Mi estigis paradizon pro ¤iu legiano ¤i tie. Kiu provas malhelpi tion, li vivu tiel, kiel li vivus en tiu Igori, kien oni sendis lin originale. Sed ekzekuto ne ekzistas. Almenaª en tiaj kazoj, kiel en la via, ni rapidigos la naturan morton.

Li faris veran program-parolon.

- Dizerti neeblas de ¤i tie – diris la unuokula malbonvole, kiu, Ùajnas, ke estis la plej malica homo ¤i tie. – Norde, okcidente kaj oriente estas la ßangalo, sude fluas Kongo, kie la krokodiloj gardas vin…

- Kaj ankaª mi gardas ilin! – diris la Turka Sultano.

- Vi estas multe pli malbela ol la krokodiloj – rimarkis Hopkins, kaj li,surkra¤is nian suspektindan amikon.

Tiam li ricevis vangofrapon de la Turka Sultano, ankaª el la unuaklasaj, tian, kiun rememorinte, e¤ post jaroj langoklakas miaspeca verkisto.

2

Malproksime de la fortika¢o, sur la roka montdeklivo de Kongo daªris la fervojkonstruo. La malliberuloj, havantaj la vivon de sinjoroj kompreneble ankaª ¤i tie helpis nur en la gardoservo, per skurßo kaj per bastono.

Oni ne ser¤os nin dum dudek kvar horoj, tio certas. Ïis tiam la ebriaj ßendarmoj, kiujn ni transdonis al la personaro de la fortika¢o en niaj vesta¢oj, dormos.

Ni galopis rapide. Ni estu trans almenaª la unua grava loko Colomb-Bechar tiel, ke ni povu provizi nin per ¤io.

Sed la lacaj kameloj ¤iam malpli bone eltenis la vojon. Oriente jam videbligis la eskarpo, tie kondukas la Ùoseo de Saharo, kiu renkontißas ie kun la Granda Karavanvojo ¤e la deklivoj de Atlaso, kaj ßi estas paralela kun la fervojo de Saharo al nordo.

Alfonso la Neniulo longe rigardis en la malproksimon:

- Ni iru – li diris poste. – Tie proksimißas io el suda direkto.

Ni rajdis tiel rapide, kiel la lacaj kameloj povis galopi. Kiam ni atingis la supron de la taluso, ni jam vidis, ke landira aªto kuregas sur la vojo el la malproksimo.

Subite la Ùoforo rimarkas, ke tri goumeir staras la Ùoseso. Blankhara, angla sinjoro sidas ¤e la direktilrado. Li haltas.

- Kion vi volas?

- Ni persekutas rabiston! Ni ekzekucios vian aªton en la nomo de la leßo. Vi ricevos ßin en Colomb-Bechar ¤e la ßendarmejo.

- Sed mi estas lordo Geoffrey…

- Egalas, kiu vi estas. Ïi estas leßo. E¤ unu sekundon ni ne atendas plu.

Nun aperis ankaª la juna kamelisto sur la taluso. La anglo faris heziteman movon al la startigilo, sed la „serßento" elprenis sian revolveron:

- Se vi ekfunkciigos la motoron, sinjoro, mi mortpafos vin.

- Jes. Nu transprenu do la aªton.

- Sed vi devas elaªtißi.

- Ãu?… Kiel mi atingos Colomb-Bechar-on?

- Kvin kameloj estas je via dispono apud la taluso, sed e¤ unu momento ne. Ni persekutas iun, kaj la tempo valoras multe.

La lordo elaªtißis kaj iris al la kameloj…

Je lia plej granda miro, ankaª la juna kamelisto sidis en la aªton kaj forvetruregis kune kun la ßendarmoj.

- Nun kio estos? – ni demandis preskaª samtempe de Alfonso la Neniulo.

- Ni vidos tion, ni nur estu trans Colomb-Becha, antaª ol la goumier-oj, kaptitaj anstataª ni, rekonsciißos.

Kian ajn problemon ni havis, en kia ajn pe¤o ni sidis, ni sciis, ke post kelkhora paªzo oni komencos e¤ pli furiozan pel¤asadon kontraª ni kun renovißinta forto: tamen ni veturegis fiere fronte al la malbono! Kiom da homoj atingis tien de Kongo?! Malgraª tiom da persekutantaj aviadiloj, militistaro, ßendarmoj kaj dezertaj danßeroj?

Posttagmeze estis el¤erpißonta la benzino, sed eble ßi sufi¤os…

Malproksime, inter sporadaj domoj, verdaj palmokronoj videblißis: Colomb-Bechar! Malantaª la urbo sur monteto altißis la fortika¢o. Se oni distrumpetis el Timbak, ke la tri dizertintoj estas kaptita, kio estas verÙajne, tiam neniu zorgos pri ni ¤i tie.

La aªto subite bremsis, kaj ni puÙißis antaªen. Ïi haltis apud ¤ifona arabo, portantan civilan vesta¢on.

- He! Kie trovißas benzinstacio?

- Antaª la urbo. Trans tiu subirejo. Nur kriadu laªte, ¤ar la benzistaciisto estas surda.

- Dankon.

Ni veturegis plu, kvankam la motorujo strange bruadis, kaj ni timis, ke la piÙto rajpos, ¤ar la mezurilo apenaª signalis oleon. Sed ni atingis feli¤e la benzinstacion. Alfonso la Neniulo kriegis tiel laªte, ke oni povus pensi ßin hurlo de leono.

- Hej! Benzinstaciisto!

Blankhara maljunulino elvenis. Post terura kriegado ni prenis sufi¤e da benzino kaj oleo, poste ni veturis plu…

Nur antaªen!

- Ni postlasas sufi¤e multajn postsignojn… Kio okazos, se oni denove reser¤igos nin? – mi demandis.

Hopkins levis sian Ùultron kaj lange direktis en la buÙangulon sian cigaron, kiu havis netolereblan odoron.

- Tiam ni denove akiros tri kaptitojn. Tia¢o trankviligas ilin por iom da tempo, kaj tiel ni povas kolekti multe da mono.

Yvonne diris nenion. Alfonso la Neniulo sidis apud Ùi antaªe, kaj Ùia kapo de tempo al tempo klinißis sur la Ùultron de la hispano.

E¤ lace Ùi volas forkaÙi siajn sentojn

…Nun! Ni alvenis en Colomb-Bechar-on! La trafiko ankoraª estas vigla en la urbo. Estis ¤irkaª la oka horo vespere. Se la sciigo alvenis el Timbak, tiam oni rapide arestos la tri goumier-ojn, sidantajn en la aªto. Sed ßi ankoraª ne alvenis. La venenitaj ßendarmoj el Timbak ankoraª dormis profunde en siaj celoj. Nun rapide traveturi la urbon… Yvonne svenis.

Stop.

- Descendu! – diras Alfonso la Neniulo kaj haltigas la aªton.

- Ãu vi pensas tiel?

- E§! Kiel ajn estas, ni devas ripozi. Ankoraª ni havas almenaª unu horon.

La tri goumier, alvenintaj per aªto vekis grandan sensacion. Baldaª venis ßendarmo.

- Kio okazis?

- Ni trovis la aªton en la dezerto – diras Alfonso la Neniulo. – Tiu bubo estis apud ßi. Li asertas, ke ßi apartenas al lordo Goffrey. La lordo konfidis ßin al la knabo por gardi ßin, kaj li foriris kun sia pafilo. Li ne revenis de mateno. Li diris al la bubo, ke li alvenis per la aªto el Ain-Sefra.

- Hm… Malagrable. Ne pasis pli ol kvin tagoj, kiam la lordo traveturis ¤i tie. Li ests bona amiko de la guberniestro.

- Ni ser¤is lin en la ¤irkaªa¢o, sed ni nenia trovis liajn spurojn. Li ne kunportis akvon, malbono okazis al li, tio certas.

- Kion vi volas fari? – demandis la „kolego".

- Ni veturis per la aªto en Ain-Sefra-on.

En la gastejo Yvonne kuÙißis en iu ¤ambro. £i povis nek manßi pro la el¤erpißo. Ni vespermanßis en la drinkejo. Malrapide, trankvile, kiel la ßendarmoj kutimas fari tion.

Alfonso la Neniulo levis sin glason al la lumo, li trinkis tiel senzorge.

Hopkins resendis la viandon, por ke oni rostu ßin pli bone. Mi petis ¢urnalon. Jen tio estis sur ßia titolpaßo:

„Oni kaptis la tri dizertintojn!
La senekzeple lartaj aventuristoj kondukis la tutan armeon je la nazo.
Kiu respondecas pro la hontinda fiasko?"

Ni eksciis el la artikilo, ke la gazetaro de tagoj okupißas nur pri ni. Oni faras vetojn. La popolo sekrete estas niaflanke. La tri rezolutaj homoj imponas al ili. La pozicio de la ministro pri koloniaj aferoj Ùancelißis, okazis kelkaj transpostenigoj, oni kantas kanzoneton pri ni en iu Pariza amuzejo. Ïi estas la vera Ùlagro.

Se oni scius, ke ni vespermanßas ¤i tie!

Alia anonco:

„Markizo de Surenne estas en la ¤efkomandejo de Maroko."

- Ni transdonos la leteron al li – diras Alfonso la Neniulo.

Nun envenas kvin soldatoj. Legianoj. Ili parolas laªte kaj mendas vinon. Inter ili estas dikstatura, liphara homo.

- Mi asertas, miaj amikoj, ke tiuj tri homoj estas veraj bravuloj – diras iu.

- Kvankam ili sukcesus fußi! Mi elkore deziras tion! Tiuloj meritas ßin!

Veni de Kongo ßis Timbak! Senarmigi ta¤menton! En manbatalo… Trompi duonon da Afriko!

- Mi asertas, Thorze, ke bona soldato ne dizertas.

5

Thorze!

La okuloj de Hopkins la £tipulo elstarißis. Li estas la legiano n-ro 71! Anstataª kiu li soldatservas!

Alfonso la Neniulo kaptis lin je la brako, ¤ar la dikulo ekstaris.

- Psit! Restus sidanta! Frenezulo! Nun temas pri multe pli grava afero.

La soldatoj paroladis plu. La homo kun anglaj lipharoj, Ùajnas, ke li estis Thorze, kontraªdiris.

- Vi ne paravas! Ankaª mi estis dizertinto iam, tamen mi estas bona soldato! Oni distingis min en Sudano. Lastfoje, kiam mi ankoraª soldatservis ¤e la kompanio la unua, oni distingis min en Padomir. Kiu estas bona soldasto, se ne mi?

- Kial oni postenigis vin al la kompanio la dua en Meknes?

- Kiam ni marÙis al Senegalio, mia kruro vundißis en Dakar, kaj mi devis enhospitalißi. Post mia resanißo oni postenigis min kun malkompleta ta¤mento al la tankistoj, kaj de tie mi estis sendita al la kompanio de Meknes…

Hopkins la £tipulo bezonis la plej grandan sinregon. Fine! Jen estas la vera Thorze, anstataª kiu li soldatservas, kaj nun li devas silenti.

Momenton!

- Knaboj! Mi havas planon! – diras £tipulo.

- Nu?

- Tiu aªto estas bone konata, kaj oni baldaª estos sur nia spuro.

- Nu?

- Se iu el ni oferus sin, tiam oni perdus la spuron de la aliaj. Mi ekveturos per la aªto, kaj vi iros plu. Ïis kiam oni kaptos mi, tio bezonas minimume duon tagon.

Ni rigardis sur lin kortuÙite.

- Hopkins! – diris Alfonso la Neniulo. – Mi nun ekkonis vin vere. Vi havas noblan, heroan karakteron!

- Ïi certas. Kome nenia malbono povas trafi min – li respondas.

- Kial?

- Jen estas Thorze, kiu estis la soldato n-ro 71 ¤e la bataliono de Oran, mi do ne povas esti Thorze, la soldato n-ro 71 el la bataliono de Oran. Sed neniu rajtas prirespondigi min, kiel civilulon, ¤ar mi klopodis veni en la pitoreskan Oran-on el la malbelega regiono de Kongo. Ãu mi Ùtelis? Ãu mi trompis? Ãu mi rabis?

- Jes! – ni respondis samtempe.

- Nu bone… Sed oni ne scias tion, ßi ja okazis ne ¤e Kongo, sed kiam mi agadis ankoraª kiel partikularisto.

Ni vekis Yvonne-on, kaj post kvi minutoj la aªto rapidegis.

DEKDUA ÃAPITRO

1

Alarmo!

Ni ankoraª ne estis ekster la urbo. Aª la lordo alvenis en Colomb-bechar, aª la kaptitaj ßendarmoj sobrißis, kaj oni jam sendis radioinformojn.

Hopkins sidis ¤e la direktilrado. Li klinißis antaªen, la benzino bruante funkciigis la motoron, kaj ni furioza veturegis en la nokto… Ni ¢us forlasis la urbon.

Ãe iu turnißejo la bremso grincis, kaj ni haltis.

- Elaªtißu! – diris £tipulo.

Rapida manpremo… Elsaltinte el la aªto, ni kuris al la apudÙosea fosa¢o… La aªto brue forveturegis kun Hopkins en la nokton.

Ni rapidis tra senvojaj vojoj kaj kampoj. Post dek minutoj ni vidis, ke militistaj aªtoj kuregas sur la malproksima Ùoseo, klakas hufoj de ¤evaloj… Tio estas la demando, kiam eltenos Hopkins.

Nun aªdißas fajfo de trajno el la direkto de la urbo. Ïia reflektoro lumas malproksimen en la nokton…

- La trajno… - diras Neniulo. – Ïi traveturos Atlason… En Marokon…

- Nu kaj?

- Ni iru…

Sed li kuris ne al la urbo, sed al la Ùtonminejo de Colomb-Becha, kie nun ¤io estas silenta. La malliberuloj laboras nur tage en la terura varmego. Kelkfoje vartrajno haltas ¤i tie, kiun oni kargas.

La semaforo kaj la relkomutilon oni funkciigas el bariergardista dometo.

- Atendu – diris Alfonso la Neniulo al Yvonne. – Vi, venu kun mi.

Ni frapetis sur la pordo de la bariergardisto, poste ni metis lin Ùnurligitan en iun angulon.

Ni funkciigis la semaforon, ke ßi indiku halton, kaj ni elrapidis. Alfonso la Neniulo trankviligis la nervozan, lacan knabinon per kelkaj vortoj.

Sed tio estintus mia tasko, sed nun mi ne volis diskuti. Ni atendis pli ol duonhoron. Nek la spuron de la persekutantoj ni vidis sur la malproksima taluso. Hopkins havas avantaßon , kaj la kvin litra aªto estis en bonega stato, kiam ni transprenis ßin.

Venas la trajno. Ïi malakcelas… poste haltas, kaj eligante fumnubojn ßi staradas.

La maÙinisto kaj la hejtisto elklinißas, sed saltinte sur la lokomotivon, ni direktas revolveron al ili.

- Ek! Antaªen!

La atakantoj ne Ùercas en Saharo, tion bone scias la hejtisto kaj la maÙinisto. Ni helpas Yvonne-on grimpi sur la Ùtupetaro… La masinisto manipulas la prenilojn.

- Kion vi volas? – demandas la hejtisto.

- Transveturi Atlason. Ni foßas de Kongo! Kiom da stacio estas ßis tie?

La maÙinisto ekkriis:

- Ãu vi estas tiuj?! Hej, knabo! Hejtu la lokomotivon tiel, kvazaª ni estus en la infero!… Ãu vi estas tiuj?…

- Li ßoje okulmezuris nin, dume li rapide manipulis la prenilojn, kaj post nelonge la trajno kuregis tiel, ke ßi preskaª desaltis de sur la reloj.

La hejtisto premadis niajn manojn.

- Knaboj – li diris -, ¤iu vera franco zelotas por vi! Kiel frenezaj homoj vi estas!

- Kaj nun ili okupis e¤ la trajnon.

La populareco estas grandega alianculo! Nun jam ¤iu simpla homo protektas nin, ili ßojas, ke ili povas helpi nin kaj dividi la popularecon kun ni.

Yvonne unue eksidis, poste li sternißis sur la karboamaso kaj ekdormis.

La hejtisto kaj la lokomotivestro laboras tiel, ke se la afrika trajno povus gajni la premion pri rapideco, tiam la blua rubando de la marÙipoj ornamus la kamentubon de la lokomotivo. Ili proponas al ni trinki vinon kaj elprenas la manßajon, kiun ili portis dehejme. Famaj rabistoj povis ßui tia¢on, kiujn la popolo akceptis en sian koron pro io. Robin Hood povis travivi la saman aferon, inter la lokomotivestroj de sia epoko.

Aªrore la trajno jam ascendis sur la rokoj de Atlaso, kaj antaªtagmeze ni estis sur la supro de la montaro.

Ni dormis alterne, ¤ar malgraª nia populareco ni estis singardemaj…

Posttagmeze ni jam malsuprenveturis sur la orienta deklivo de Atlaso! Se ni alvenos en Marokon, al markizo de Surenne, tiam ni gajnos la aferon!

- Haltu! – diris Alfonso la Neniulo. – Nur tiom longe, ke ni povu desalti!

La maÙinisto malalkcelis, kaj ni desaltis. Alfonso la Neniulo tenis Yvonne-on inter siaj brakoj.

La knabino dormis ankaª dum dormo.

La trajno tuj veturegis plu. Malgrandaj vilaßoj estis videblaj ¤irkaªe sur la montdeklivo. Kaj malproksime… Dio mia! Maroko!

- Ni adiaªas vin ¤i tie, Yvonne – diris Neniulo. – Nun jam vi ne povas veni kun ni. Vi havas parencojn en Maroko, telefonu al ili, kaj nun jam uzu la nomo Duran…

- Ãu vi…

- Ni iros plu.

- Knaboj… Dio… Dio… - Ùi ne povis daªrigi. £iaj okuloj plenißis per larmoj.

Alfonso la Neniulo ¤irkaªbrakis Ùin. Poste Ùi paÙis al mi, kaj ambaªmane prenis mian vizaßon kaj kisis mian frunton.

£i do tamen! Amas min!

2

Ni ekripozis en la mezo de vinbermonto.

- Nun ni devas for¢eti tiujn vestojn. Se la trajno alvenos al Maroko, tiam oni ser¤os nin ¤ie en la ¤irkaªa¢o.

Ni vidis dometon iom malproksime. Araba paÙtisto povis loßi tie. Ãirkaªe estis Ùafoj.

- Ni iru! – li diris. - Antaªen!

La paÙtisto drinkadis kun sia kampgardista amiko. Ni frapetis sur la pordo. £nurliginte lin kaj lian amikon, ni metis ilin sub la tablon. Poste ni ekiris sur ambaª flankoj de la vojo al Maroko.

Mi en la vesta¢o de la kampogardisto, Alfonso la Neniulo kiel paÙtisto kun proksimume kvardek Ùafoj. Pasis nek dek minutoj, kiam la militistaro aperis en la malproksimo. La polica aªto kuregis antaª ili

Mi tuj surventrißis. Alfonso la Neniulo iris trankvile kaj peletis la kvardek Ùafojn antaª si.

Oni nek rigardis tien, ¤ar la ideo estis tiel absurda, ke ili povas estis la fußintoj… Ni jam estis nur kelkcent metrojn de la urbo, kiam ni komprenis, ke ¤io estas vana. La polico kaj la militistaro tenis la vojon, kondukantan al Maroko okupita.

Ïis kie la rigardo atingas, ¤ie estas armiloj, stiletoj. Sed nek tio estintus mirinda, se oni ordonus ßeneralan mobilizon en la respubloko, kaj deklarus sießan staton pro la tri homoj.

Antaª la apudvoja la restoracio por la Ùoforoj staris du aªtomobiloj, sed neniu estis interne. La posedantoj de la aªtoj estis akompanataj al la polico por legitimi ilin.

Malpli proksime staris ankoraª alia aªto sur la vojo, la Ùoforo legis ¢urnalon en la ombro de la domtegmento.

Alfonso la Neniulo mansigis al mi. Poste li iris tien kaj alparolis la Ùoforon. Mi Ùtelumis al la alia flanko.

£nurliginte la Ùoforon, ni metis lin sub malproksiman arbuston.

Dume la kvardek Ùafoj atendis.

- Sidu en ßin – diris Neniulo -, kaj veturu per la aªto al tiu arbo, kiu staras apud la drinkejo, sed anticipe elsaltu.

Li lasis min tie. Mi sciis, ke li malofte faras stulta¢on, mi do faris tion, kion li petis. La aªto renversißis kun granda grincado, sed anticipe mi elsaltis.

Poste mi iris en la drinkejon. Apenaª estis io sur ßia loko.

Eble granda interbatado okazis ¤i tie. Ãio estis renversita, vitreroj, rompitaj seßoj, la proprietulo kaj la kelnero kuÙis sur la planko iom draste draÙitaj.

- Kio okazis ¤i tie?

- Mi telefonis… - diris Neniulo. – Nun ni trinku gluton da drinka¢o.

Post kelkaj minutoj aªdißis akra sono. Sireno.

- Denove venas polica aªto! – mi diris.

- Ne. Ïi estas savaªtomobilo. Mi vokis ilin telefone al renversita aªto…

La ambulanca kuracisto kaj la Ùoforo miris, ke neniu estas apud la vrako. Ili miris multe pli, kiam ni batis ilin je la kapo tiel, ke ili falis sur la teron svenitaj. Ãar la savaªto estis tie, ni metis ilin sur la brankardon, kaj la aªto ekveturis reen.

Ïi kuregis al la kordono kun sirenado. Alfonso la Neniulo portis la ¤apon kaj la mantelon de la Ùoforo. Mi sidis apud la malsanuloj, kiel kutime ¤e la ambulanca servo, ¤ar de tempo al tempo eble rekonsciißos iu sveninto kaj maltrankvilißos…

Tiam mi denove batis lin je la kapo, kaj ekestis silento.

La kordono disißis, kaj la aªto alvenis en Marokon, kun laªta sirenado, rekte al la domo de la ¤efkomandejo. La savaªto vekis ßeneralan sensacion.

Alfonso la Neniulo elsaltas kaj iras al la gardostaranto:

- Grave vundita ¤efoficiro estas kun ni. Li volas diri ion al markizo de Surenne. Ïi estas grava militista sekreto. Rapide! Neeblas movi lin e¤ el la aªto, ¤ar li estas mortanta.

La gardostaranto forkuras. Mi ankoraª lastfoje batas miaj flegatojn je la kapo, kaj ankaª mi elaªtißas.

Ni estis ¤i tie! De Kongo!

- En la nomo de la leßo!

Dek policistoj ¤irkaªis nin. Dek revolvertuboj direktißis al ni.

- Atendu! Ni kunportis gravan ordonon!

- Ekiru, aª ni pafos.

- Ne!

Ni diris tion samtempe.

Kaj nun markizo de Surenne elpaÙis tra la pordego mirante. La polickapitano mansalutis rekte staranta.

- Ekscelenco! Ili estas la dizertintoj, alvenintaj el Igori!

- Kiel diable vi povis veni ¤i tien?!

- Per savaªto!

- Mi konas vin – diris la markizo, post kiam okulmezuris nin. – Mi bedaªras, ke via kariero finißis tiel.

Alfonso la Neniulo mansalutis.

- Sinjoro admiralo! Ni devis enmanigi leteron al vi…

Kaj li transdonis la leteron al la adresito!

- Hm… - diris la markizo -, kio ßi estas? Ãu kuirlibro?

- Pardonon…

Ïi estis la alia koverto, en kiu ni kunpotis la kuirlibron de Levin en la ßangalo. Sed post momento… Jes! Ïi estas tiu momento, por kiu estis inde veni en tiun ¤i mondon:

Ni transdonis la veran koverton kun kvin sigeloj, sendifektan, en ßi la raporto de la generalo!

Dume ¤irkaªis nin homamaso, konsistante el miloj da personoj, kaj la aro de la scivolemuloj tumultißis ¤ie en la proksimaj stratoj.

Bruo, kriado, pumbatoj de la gumbastonoj, la virinoj Ùrikas… Kelkaj homoj vivus mallaªte, oni arestas tiujn…

La vivo en la stratoj de Maroko tute paralizißis. La informo disvastißas en la urbo, ke ni estas ¤i tie, kaj ¤iu volas vidi nin.

- Kiu sendas tiun leteon?

- Ni rajtas diri nenion al via ekscelenco pri la letero .

- Kial?

- Ni estas soldatoj. Ordono estas ordono.

…La homamaso trarompas la kordonon… glavo ekbrilas, bastono pumbatas, kriegado… Oni premas nin al la profundo de la pordego.

Markizo de Surenne metas la leteron en sian poÙon:

- Konduku ilin al la kapitano de la fortika¢o Gueliz – kaj li turnas sin al ni. – Ãu tiu letero signifas mildigan cirkonstancon antaª viaj jußistoj?

- Oui, mon excellence.

- Se ßi estas tiel, rilate viajn malnovajn meritojn, mi zorgos, ke la milita tribunalo konsideru tion. Kvankam, kion vi faris, pri tio apenaª ekzistas senkulpigo… Domaße, ke vi subißis al tiu ¤i stato…

Li turnißis kaj lasis nin tie. Dume la policistaro estis fortigita kun soldataro, kaj la rumora homamaso estis premita en la flankstraton, per sinsekvaj atakoj.

DEKTRIA ÃAPITRO

1

Ni trankvile toleris, ke la kaporalo katenu nin. Oni rapide puÙis nin en granda, grizan militistan aªton, poste ni ekveturis… Baldaª ni staris en la korto de la fortika¢o Gueliz. Unue ni estis kondukitaj al la gardistejo, kie oni traser¤is niajn poÙojn.

- Damne… - blasfemas la serßento.

Jes, kvar-kvin revolveroj, kelkcent kugloj, tran¤ilo, plumba bastono: nur ¤e du homoj ßi estas sufi¤e timiga vida¢o.

- Kio ßi estas?

Li trovis la kuirlibron de Levin.

- Mi petas vin – diris Alfonso la Neniulo -, ßi estas tre grava krimdokumento. Zorgeme gardu tion.

- Jen vidu!… - diras nun la kaproalo. – Kio ajn mi estu, se ßi ne estas la kuirlibro de Levin!

- Jes ßi estas! – mi respondis.

- Ãu vere?! – krias la kaporalo. – Montru do sur la foto, kiu estas la fama Levin…

- Jen li estas, kiu sidas… Ãi tie trovißas mi, dekstre. Mi estis lia Ùatata dis¤iplo…

Fine! Fine ni ekscios la sekreton!

- Sinjoro kaporalo! Ãu vi estas dis¤iplo de Levin?

- Jes, kompreneble!

- Kiu estis Levin?

- Ne ¤ikanu min!… Ãu vi volas aserti tion, ke vi ne scias, kiu estis Levin?… Kial vi fabelas tia¢on?

- Mi vere ne scias tion…

- Ba, kial vi Ùercas… lasu min trankvila!

Tiam mi falis surgenuen kun interplektitaj fingoj kaj ekparolis jene:

- Sinjoro kaporalo! De monatoj kelkfoje mi tre suferis, ¤ar majstro Levin, kun kiu mi havis la malfeli¤on esti en la sama malliberejo, li atendis, ke oni bone konu lin laªfame! Mi nun solene konfesas kaj ¢uras, se vi deziras: mi ne scias, kiu estis Levin. Priridu min pro mia nescio, malestimu min, mi petegas: surkra¤u min, sed diru, kiu estis Levin?!

La kaporalo plenumis mian peton. Li surkra¤is min kaj rakontis, kiu estis Levin:

La granda Levin jam en lia frua juneco, kiel tajloro de pantalonoj komencis sian karieron en la pitoreska Cape Town. Sed lia koro jam tiam entuziasmis pro la granda kulinara scienco. Kiam li havis dudek jarojn, li ankoraª tute ne konjektis, ke la Kristnasko de la venonta jaro, kiel grandan Ùanßißon signifos en lia vivo. Tiun Kristnaskan vesperon oni kaptis lin ¤e freÙa faro dum rompÙtelo. En la pitoreska Cape Town. Kiam oni demandis lin, kian laboron li Ùatus fari, al kio li eble havas emon, li respondis:

- Mi deziras esti kuiristo. Ãar mi estas konvinkißinta, se ¤iu homo povus vivteni sin laª Ùatata profesio, tiam ne estus krimulo sur la terglobo.

- Kio vi estis antaªe?

- Gladisto de pantalonoj. Kaj tio kaªzis mian pereon. Mi ne sentas elvokitecon al la pantalongladado. – Li kriis plendinde, pugne frapinte sur sian bruston: Lasu min kuiri, kaj mi plibonigos la homaron!

Oni ne tro bone akceptis tiun lian aserton, sed Levin devis preni ¤iuvespere hipofosfaton laª la ordono de la adjutanto, ke liaj nevoj iomete resanißu, antaª ol tiu ideo ekregus la tutan organismon de la malliberulo.

Post unu semajno la traveturanta kimra princo vizitis e¤ la pundomon, kaj tiam Levin (kvankam li regule prenis la hipofosfaton) li ¢etis sin antaª la piedojn de la tronheredanto kaj ekkriis jene:

- Sinjoro! Mi volas kuiri! Kial estas tiel, ke la malliberuloj povas lerni ¤ion, nur kuiri ne?!

La princo ßisaªskultis la peton de Levin. La ideo pla¤is al li, laª kio ne estus krimulo, se ¤iu homo povus vivi el sia Ùatata profesio.

- Direktoro – diris la princo -, estu Cape Town la sola prizono, kie la malliberuloj povas lerni ankaª kuiri.

- Sed sinjoro, kiu estu la instruisto?

- Mi komprenas. Mi transdonos mian Ùipkuiriston kiel instruiston al la kuir-kurso.

Post du monatoj la kuiristo de la princo revenis al sia posteno, kaj Levin transprenis la instruadon por unu tuta jaro. Tiam la granda homo liberißis. Lia princa moÙto ¤iufoje, kiam li estis en Cape Town, konsideris kiel devon, portigi la tagmanßon el la prizona kuirejo de Levin. Tion jam nur malbonvolaj homoj disvastigis, ke la tronheredanto tial ne ofte vizitis Sud-Afrikon.

Oni publikis longan artikolon pri la afero, kaj la hotelo Savoy en Londono dungis Levin-on post lia liberißo. Sed post duonjara laboro oni kondamnis lin al longdaªra puninstruado en kuir-kurso de malliberejo.

La nomo de Levin farißis nocio! Foje dank' al stranga hazardo li longe estis en libera stato, kaj la princo invitis lin sur sian Ùipon por kuiri al la gastoj laª la menuo de Levin. Tiuokze ankaª la foto de Levin aperis en ¤iu grava ¢urnalo, kiu prezentas, ke li atendas la kimeran princon en la societo de bovid-frikando kaj helpkuiristo…

- Tiu foto en la kuirlibro – finis la kaporalo la historion – estis farita en la prizono de Johanesburgo, en Sud-Afriko, kie ankaª mi estis la instruito de Levin, pro kontrabando.

- Bonvolu diri – ekparolis Alfonso la Neniulo kaj fingre montris sur ulon, kiu portis antaªtukon de helpkuiristo kaj vesta¢on de malliberulo. – Ãu vi konas ankaª tiun kolegon?

- Jes, kompreneble!… Li estas Brigeron! Agresema, kruela rabmurdisto!

Mi rigardis tien, kaj mia buÙo restis malfermita. La dis¤iplo de Levin, la rabmurdisto, nomata Brigeron estas neniu alia, ol la unuokula inßeniero el Igori!

2

Neniulo ridetis, ¤ar mi staris tie, kiel idioto.

- Ãu vi ne komprenas? La unuan tagon, kiam ni alvenis al Igori. Levin mendis marinitan fiÙon. Kaj li rekonis sian iaman disciplon el lia kuir-stilo! Poste li apartenis al la pli bona kategorio… li iradis kiel inßeniero en eleganta vesta¢o… Kompreneble, tiu dis¤iplo faris tion al li, kiu estis preta kuiri marinitan fiÙon…

- Brigeron ne bone kuiris fiÙon – rimakis la kapralo. – La rabmurdistoj pretigas bone nur surkrade aª pikstange rostitajn viandojn, eksluzive laª angla maniero, la fiÙo estis la speciala¢ de ricelistoj kaj enÙtelißintaj rapistoj. La granda Levin sciis preciye, ke iuj krimuloj al kio havas talenton. La vere bonajn supojn el kokin-viando kaj kuiritajn bov-viandojn pretigis la la ¤antaßistoj, sed baki dol¤a¢ojn kaj krema¢ojn alproprigis plej rapide la knabin-komercistoj kaj la poÙoÙtelistoj.

Post la mallonga ekspliko oni akompanis nin en karceron.

- Diru, de kiam vi scias, ke la foto de la unuokululo estas en ßi – mi demandis de Alfonso la Neniulo.

- Kiam Levin venis al ni en la *Trogo* kaj mi demandis lin, al kiu li povas danki tiun karieron? Li respondis, ke li havas dis¤iplon en Igori, kiu protektas lin.

- Mi memoras!

- Nu… Tiam venis en mian kapon la foto, trovita en la libro, kiu prezentas Levin-on en la rondo de siaj dis¤iploj. Kiam mi rigardis la bildon, mi tuj vidis la unuokulan inßenieron inter la dis¤iploj.

- Kio okazis al la Turko? Li jam longe devintus alveni kun la letero.

- Mi ne scias. Estas suspektinde.

- Ãu ßuste la Turka Sultano ne estos suspektinda?!

- Ãu vi pensas, ke markizo de Surenne ankoraª ne legis la leteron? – mi demandis iom poste.

- Mi timas, ke eble nek tio helpos nin, se li legis ßin.

- Ãu? Kiel vi komprenas tion?

- Eble okazis tia¢o en Igori, ke… kiel la generalo diris: oni prisilentos ßin! Tiam oni oferos ankaª nin, ignorante la leteron. Ni estos postenigitaj en iu malproksima garnizono de Sharo kiel dizertintoj.

Eblas, ke Alfonso la Neniulo denove trafis la veron…

3

…Poste oni kondukis nin al la kapitano. La granda kontoro estis plenplena de scivolemaj oficiroj. Generaloj, majoro, unu kapitano de la spahioj, la adjutanto de la gubernatoro: ¤iuj oficiroj, restadantaj en Maroko ¤eestis, kiuj havis eblon veni ¤i tien.

- Alkonduku ankaª tiun dikan friponon… - diris la kapitano al la suboficiro.

Do ankaª Hopkins estas ¤i tie.

- Vi estas frenezaj homoj. Sed vi amare pagos pro la hontigo de la armeo.

Ãefleªtenanto paÙis antaª nin.

- Kie estas la kanbino, kiu estis kun vi ankoraª ¤e Colomb-Bechar?… Ãu?!

- Ni diros nek tion, nek Ùian nomon, mon commandant – respondis Alfonso la Neniulo. La oficiro skuis sian pugnon antaª nia nazo:

- Gardu vin, se vi mensogos! La dikulo konfesis ¤ion!

Li volas trompi nin per tia truko! Ïuste Hopkins estas tiu, kiu konfesas. Kaj ¤ion!

Sed ßuste nun li estas alkondukita. Eble oni iomete draÙis la knabon, ¤ar liaj nazo kaj lipoj estas Ùvelintaj.

Sed kio okazis?!… Kiel li envenas? Kiu vidis tia¢on? Li ridetas kaj eklevas sian ¤apon:

- Humile via!

- Senrangulo! – krias la kapitano. – Kiel vi kondutas?

- Mi dankas vian demandon, sinjoro kapitano…

Ãu li frenezißis? La leªtenanto staras antaª lin.

- Kanajlo! Ãu vi simulas?!

- Mi ne simulas. Mi estas civilulo, kiun vi tenas en kaptiteco kontraªleße!

Nun oficiro paÙas al la leªtenanto.

- Mi petas vin, ßi estas tre stranga afero. £ajnas, ke la arestito vere estas civilulo, ¤ar soldato nomata Thorze, registrita kun la samaj personaj indikoj servas ¤e nia bataliono la dua, en Meknes…

- Ãu ankaª vi asertas, ke vi estas civiluloj? – turnis sin la komandanto al ni.

- Ne, mon commandant…

La leªtenanto minace sibletis per sia bastono.

- Kie estas la kanbino?! – li demandis mallonge.

- Se la sinjoro leªtenanto nun malbone traktos nin, post nelonge vi bedaªros tion – mi diris tion kun soldata estimo.

- Kiel?! Vi do kondutas nun tiel…

- Atendu… - interrompis la majoro. £ajnas, ke li lernis el la afero de Hopkins.

- Kiel komprenas tion, vi, patromurdisto, ke ni bone traktu vin?

Sed li ne havis tempon respondi. La pordo malfermißis, kaj markizo de Surenne enrapidis.

DEKKVARA ÃAPITRO

1

Lia ekscelenco venis persone… Huh! Kiel li aspektis! Lia vizaßo estis rußa. Ïi elradiis koleron, ßojon kaj fierecon.

Ãiuj maleoloj klakante kunfrapißis samtempe en la ¤ambro.

La komisaro de la gubernatoro preteriris antaª ni kaj longe okulmezuradis nin. Poste li turnis sin al la oficiroj:

- Sinjoroj! Mi deziras, ke tiujn tri homojn ¤ie, kie oni parolas pri ili, estu menciataj, kiel la plej bravaj, la plej sinoferaj, la plej fidelaj soldatoj de la respubliko!…

Konsterna silento por momento, nur Hopkins murmuretas mallaªte:

- Menciu ankaª tion… ke mi estas civilulo.

- Krome mi ordonas – li daªrigis per laªta vo¤o -, ke morgaª ¤iu kompanio de la armeo menciu en la tagordono tiujn tri homojn, al kiuj mi nun etendas mian manon. – li premis nian manon unu post la alia. – admiralo de Surene ¤iam estos fiera pri tiu manpremo.

Li estis tia homo! Sehezite li starigis al la muro la malkuraßajn, malbonajn, damaßajn soldatojn, sed neniu taksis pli alte la veran plenuma¢on, ol li.

Alfonso la Neniulo elpaÙis sin rektiginte.

- Parolu!

- Ni subordige dankas la altan rekonon de via ekscelenco. Ni plenumis nian devon, kiel decas al bona soldato, tio estis ¤io.

- Ili – li turnis sin al la oficiroj – malkaÙis la plej fian perfidon kaj plenumis la plej malfacilan militistan ordonon ekde la memoreblaj tempoj, kiam ili kunportis sekretan raporton rekte al la militestraro tra fajro kaj akvo… - kaj li okulmezuris nin. – Kiaj… homoj ili estas… - li diris ridante, sed liaj okuloj brilis strange…

2

Iun tagon la garnizono de Fort Lamy, konsistanta el cent soldatoj, vekißis je surprizo en la ßangalo. Tri aviadiloj surterißis sur la malgranda flugkampo en rapida sinsekvo. Alvenis oficiroj.

Neniu sciis, kio okazis. Oni deÙanßis la kapitanon de la fortika¢o kaj la radioteknikiston. Ili forlasis la fortika¢on Fort Lamy per aviadilo. La kapitano suferis akcidenton dumvoje. Li falis el la aeroplano iel. E¤ tion oni kla¤adas ¤ie, ke li mortigis sin mem. Oni ordonis al la garnizono tuj ekmarÙi.

Ãe la bordo de Kongo ili subite daªrigis sian vojon orienten. Ili marÙis rekte al Igori en fortostre¤aj etapoj.

Samtempe svarmo de aviadiloj aperis super Igori… Terura motorburo plenigis la aeron, kaj oni metis la jenan radiogramon antaª la kapitanon:

„Post dek minutoj malliberuloj, indißenoj kaj gardistoj kolektißu en la fortika¢o. Nia ordono estas la sekva: Se e¤ unu homo provos forlasi Igori-on, ni ekstermos la fortika¢on per bomboj! Oni deÙanßis la komandantojn de Fort Lamy, la garnizono estas fortikigita per leßera baterio, Igori estos okupita dum la daªro de tri horoj. Post dek minutoj ni komencos pafi per mitraloj. Kiu estos ekster la fortika¢o, ni mortpafos tiun."

Post dek minutoj la malalte flugantaj aviadiloj komencis parfi la ¤irkaªa¢on per mitraloj

Posttagmeze je la sesa horo Igori kapitulacis sen rezisto. Je la sepa horo oni finis la unuan esploron, kaj dek ses homoj estis tre rapide mortpafita malantaª la fortika¢o. Inter aliaj Brigeron kaj Fadeno, la zumkantinta, duon-idiota kaporalo. La „kapitanon" oni liveris katenite en Oran-on…

Nur kelkaj linioj aperis en la gazetoj pri la afero:

„En Igori la bagnanoj provis fari ribelon, kiun subpremis la garnizono de Fort Lamy. Tri dizertintaj soldatoj, el kiuj unu estas civilulo, venis en Igori-on konfiditaj de la sekreta servo, kaj la kolonia armeo intence ne urßigis nian areston."

Tiun dolorkompenson ricevis la multaj azenigitaj instancoj. Sed ni sciis, kiom ili urßigis nian areston…

3

La loßantoj de la kabano certe aspektis malbone, kiam kapitano Péret iris por ili kun sia ta¤mento. Potrien atendis lin sur la sojlo. El la flava, velka vizaßo de la serßento malgaje elstaris lia nazo kaj konsistaj partoj de liaj lipharoj kaj barbo. Tamen li staris rekte, kiel kandelo antaª Péret.

- Serßento Potrien anoncißas, sinjoro kapitano.

La kapitano premis la grandan, ostan, faltan manon:

- Vi aspektas malbon, mon chet… - kaj li frapetis la torakon de la serßento inter la rustaj butonoj de la Ùima, malseka kamizolo. – Ãu el¤erpißis la rezervo ¤i-interne?

La vizaßo de serßento farißis iom rußa, kaj ankaª liaj okuloj viglißis pro la ektuÙo.

- La afero iomete suferigis min. Mi pensas, ke mi devas peti tri libertagojn, por ke ¤io estu en ordo ¤e mi. Sed mi ne volas iri en la malsanulan ¤ambron.

La kapitano ridis kaj frapetis la cikatroplenan, multe suferintan, malgrasan vizaßon.

- Alors!… Tout va bien… mon chef!

La maleoloj kunbatißas.

- Si! Mon commandant!

La kapitano volis iri plu, sed la serßento staris antaª lin.

- Estu singarda, mon commandant. Korpogardisto staras apud la generalo, ¤ar ni pensis, ke tiuj friponoj venos por mortigi la ¤efatestantojn.

- Ãu korpogardisto? Kio ßi estas?

- Li estas kaptito kun ni. Li estas tre brava kanbo – kaj li kriis en la alian ¤ambron: - He, vi, kanajo! Alvenis niaj kamaradoj.

- Tamen vi ne devas kriegi!

La Turka Sultano aperis ¤e la pordo, en la mano kun kuireja tran¤ilo.

4

La Turka Sultano ankoraª tiun vesperon resis ¤i tie, kiam ni ekvojis. La fumanta lokomotivo esis ekveturonta sur la industria, etÙpura trako. La Turka Sultano komencis rapidan flustradon kun la lokomotivestro.

- Jen estas kvinmil frankoj. Nun mi kaÙißos en la vagono kaj rulu karbon sur min…

- Bone…

- Rapide!

La Turko okupis lokon en malgrand, ¤arosimila, etÙpura vagono, kaj la maÙinisto rulis karbon sur lin…

Post dek minutoj la trajno ekveturis, eligante densajn fum-nubojn… Diablo forportu ßin! Tiu ¤i vagono ne movißas. Kio okazis? Oni dekro¤is ßin! Li rapide levißis, kaj surpriza vida¢o akceptis lin. Dek soldatoj staris tie kun pafpretaj pafiloj. Meze Fadeno, la „kaporalo".

- Elvagonißu!…

Oni ¤irkaªis kaj akompanis lin en la kontoron.

La kapitano akceptis lin ridetante.

- Dekomence ni estis klarvidaj pri vi, Boulanger. Ãar via kuracista amiko, Kvasti¤ perfidisi vin.

- Tio ne estas vera!

- Jes. Kredu ßin. Tiu homo parolas dormante, kaj nokte li elbalila¤is ion kaj alion pri la afero, tiel li rakontis ankaª pri la etÙpura fervojo. Nun vi iros al viaj kompanoj. Mi bedaªras, sed mi multe amuzißis pri vi. Traser¤u lin!

...Kiam oni volis preni la binoklujon de li, li batalis kiel tigro. Li volis disÙiri la leteron.

Oni rompis lian nazon, iu batis lin je la dorso per kolbo, sed li defendis sin, kaj li vangofrapis la malaltan kaporalon tiel, ke ties tri dentoj elfalis… Oni tamen prenis la binoklujon de li.

La kapitano malfermis ßin.

- Hm… kial vi kolektis cigarstumpojn en ßi?

- La okuloj de la Turka Sultano rondißis pro miro, kaj fine li diris tre surprizan frazon:

- Hu! Tiu… mizera… Ùtelisto!

5

De tiam pasis unu jaro. Nun jam mi povas skribi pri la afero.

Pittman konfesis ¤ion, li ne estis bagatelema homo. Li ridetante rakontis la tuton, kaj li ridetante iris aªrore al la ekzekuto. Li rifuzis la suboficiron, kiu proksimißis al li per tuko.

Li fikse rigardis al la dekdu pafiltuboj.

Kio estis la trompo?

Pittman alvenis en Igori-on kiel ¤efleªtanto Fleurien. Tiam oni faris mezurojn en tiu regiono de Kongo, kaj la komisiitoj de diversaj kompanioj tentis la fakulojn. La plej gravas persono estis la oficiro Fleurien, sendita por fari kontrolon, anstataª kiu Pittman anoncißis kun laªregulaj dokumentoj. Multe da aferoj dependis de lia raporto. Pittman klare vidis, kia ebleco prezentißas. Unue li lasis, ke la entreprenistoj koruptu lin, kaj li favore prijußis tiun, kiu pagis pli multe. Baldaª jam li direktis la trompon. Li sisteme malaperigis la skrupulemajn oficirojn kaj inßenierojn unu post la alia. Por neniu estas suspektinda fenomeno, kiam kelkaj homoj mortis pro malario, tifo aª insolacio en la regiono de Kongo. Igori situas tre malproksime de ¤iu kontrolebleco. Estas nekredeble multekosta kaj komplika afero organizi oficialan vojaßon al Kongo.

Iom post iom la trompa ta¤mento farißis tiel forta, ke la granda verko povis elformißi.

Inßeniero de bankrotita fervojkonstrua kompanio faris proponon pri livero de materialoj al la konstruistoj de la fervojo Belga Kongo. Tre malmultekoste. Oni akceptis la proponon. (Baldaª evidentißis, ke estis komplicoj ankaª ¤e la belga konstru-laboro.)

Poste oni liveris plu la materialon, alvenintan al la franca fervojkonstruo al la belga laborloko, kiu estis je ducent kilometra distanco. Oni simple enpoÙigis la nekredeble altajn monsumojn. Laªdire oni konstruis la francan fervojon el la malgranda parto de la materialo.

La traveturantoj aª pilotoj ne povis vidi el la alteco, ke la taluso, la kunliga ponto, la cement-bazo ¤ie estas maldika kiel papero. Oni uzis tre malmultan, malbone miksitan materialon. La reloj estas sternitaj nur sur mallonga parto, kaj tiuj finißas ¤ie, kie la trako atingas la arbaron.

…Tamen la konstrua¢oj preterkure Ùajnis demalproksime tunelo, ponto, taluso. Dum jaroj konstruißis perfekta, mallonga itinero de la belga fervojo el la defraªdita, franca materialo! Intertempe la trompistoj prosperantaj en Igori jam havis multmil-frankajn enmeta¢ojn en diversaj, eksterlandaj bankoj.

Vere estis nenia¢o funkciigi „legian paradizon" el tiu mono. Ãu gravis dekmil cigaroj Havano, ¤iom ajn hektolitroj da vino aª sukera¢o, kiam oni forÙtelis tutajn fervoj-itinerojn, tunelojn kaj pontojn?

Se iafoje tamen alvenis delegitaro al la bagno, tion oni antaªe sciis en Fort Lamy. Tiam la malliberuloj laboris, ili kolektis la luksajn meblojn en malplena hangaro kaj sendis la negrajn laboristojn hejmen. Kion oni tute ne atendis: la pureco, la diciplino de la malliberuloj, la sanitaraj aferoj vekis la plej bonan impreson en la delegitoj, kaj „¤efleªtenanto Fleurien" estis prezentita e¤ al rangaltigo.

La senranga soldato Fadeno venis en Igori-on pro dizerto, kaj li tuj ekkonis Pittman-on, kun kiu li soldatservis en la oazo Rakhmar. Fadeno informis sian bonan amikon Brigeron-on, la unuokulan rabiston, kiu estis drinkejestro en Rakhmar. Poste Brigeron pli bone ekspluatis la situacion ol la idiota Fadeno. Sed venis ¤i tien ankaª la ebria relvojgardisto de la oazo Oguri.

Li estis tie, kiam la araboj mortigis oficiron Fleurien, kaj ili liberigis Pittman-on. Rekompence por lia silento oni transpostenigis lin al la fervojo de Igori laª la propono de Fleurien, kie la ludeman fantazion havanta Pittman efektivigis ankaª lian revon: li konstruis grandan fervojstacion, ili ja havis sufi¤e da materialo. Poste li povis drinki, ordoni, furiozi laªpla¤e, kaj oni ne devis timi katastrofon, ¤ar fervoja trafiko okazis nur en la vizioj de la staciestro.

La bank-enmeta¢oj de la trompistoj ne kovris e¤ la dekonon de la damaßo, sed la rapida subpremo de la krimo savis la francan financon de netakseblaj perdoj.

Kompreneble devis esti komplicoj ankaª ¤ekape. Kelkaj neatenditaj transpostenigoj, emeritigoj, du-tri strangaj sinmortigoj forglutis la lastajn spurojn de la krimafero, kaj la detaloj restis en eterna obskuro.

6

…La aªtoj povis veturi nur tre malrapide de la Gare de St. Lazar ßis la palaco Elysée.

Kia homamaso…!

Oni kuntrenas filmreporteron kun la kamerao.

Tiel venas en mian kapon, ke en la kino¢urnalo tiam oni kutimas mansvingi al la popolo. Mi levis mian manon, sed adjutanto Potrien, sur kies kamizolo estis la tute nova ordeno „pour le merite", li sidis tiel, kiel reprodukta¢ de la statuo Budho en la vitrino, admonis min:

- Kondutu dece, vi, fripono… Kion pensas, se la prezidento demandos: „Nu, kara Potrien, kia estis via veturo sur la stratoj de Parizo?…" – kion mi diros al li?

- Vi respondos al li, mon chef…

- Ne respondu, vi, kanajlo, ¤ar mi puÙfaligos vin…

Hopkins la £tipulo sidis apud Alfonso la Neniulo kiel civilulo. En nigra redingoto, portanta nigran cilindran ¤apon kaj blankajn gantojn, kun levita kapo.

Li aspektis, kiel ekzekutisto la matenon de la ekzekuto. Nur tio mildigas iom lian festan ekstera¢on, ke lia flankenÙovißinta ¤emizbrustumo lasas vidigi sur granda parto lian strian trikota¢on…

Ni alvenas al la palaco Elysée.

Ni supreniras sur la marmora Ùtuparo malantaª generalo Duron, kaj ni alvenas en grandegan halon, kie atendas multaj elegantaj, paradvestitaj homoj. Ni staras stre¤e.

Unu suboficiro, du legianoj kaj unu ekzekutisto.

Ãiuj okuloj rigardas nin scivoleme, de la plando ßis la vertebro.

La respublikestro prenas nian manon unu post la alia. Kaj la miraklo okazas al Potrien! Kion li menciis de jaroj kiel ekzemplon! La grandsinjoro alparolis lin jene:

- Nu, kara Potrien, kia estis via veturo en Parizo…

Li neniun antaªe elpensitan respondon povas diri. Lia vizaßo estas flamrußa.

7

Alfonso la Neniulo tre ofte ricevas libertempon, kaj tiam li estas kun Yvonne.

La afero komencas esti por mi tre suspektinda! Ãu la knabino tiom forkaÙas siajn sentojn?! Estas vere, ke vizitinte min, Ùi donacis al mi belegan, oran horloßon, sed tian ricevis ankaª Hopkins. Alfonso la Neniulo post iom da tempo kondutas tre embarasita, kiam ni renkontißas. Kio estas en la fono de la aferoj? Hopkins la £tipulo ¤iutage ricevas permeson viziti min, kaj li salutas al Potrien tiel:

- Dio donu benon…

- Mi ne estas Dio por vi, sed sinjoro adjutanto! Kanajlo!

- Mi ne estas kanajlo por vi, sed sinjoro civilulo!

- Vi estas ßuste tiel impertinenta, kiel vi estis. Forportu vin! Tiu urtikfloro atendas vin en la kantino.

La urtikfloro estis mi. Sed tiun tagon mi iomete malgaje sidadis.

- Kio okazis al vi? – demandas £tipulo. – Venu en la kafejon vespere. Mi a¤etis la „Kvar strangajn ratojn" kun la Turko, kiu estas mia negocpartnero. Sed mi opinias, ke la fripono trompas min ¤e la kalkulo. Li estas suspektinda, tre suspektinda.

- Min ne interesas tio. Ãu vi aªdis, ke Alfonso la Neniulo ekssoldatißas,

- Ãu vere?

- Li anoncißis al kuracista kontrolo. Laª la stabkuracisto Alfonso la Neniulo ne estas servokapabla pro ßenerala korpa malforteco.

- Nu, kio okazis al tiu stabkuracisto? Ãu li estas nekuracebla, aª li malsanißis nur pro insolacio?

- Nek iu, nek la alia. Mi opinias, ke generalo Duran vizitis lin. Alfonso la Neniulo ekssoldatißos – kaj mi aldonis per mallaªta, vira ßemo: - Li edzißas al Yvonne!

Hopkins ¤irkaªrigardis, poste li flustris:

- Ne zorgu pri tio. Tial Ùi edzinißas al Alfonso la Neniulo, ¤ar Ùi tiel volas forkaÙi, ke Ùi amas vin.

<<< REEN AL LA CXEFA PAGXO